


# EL POPOLO CHINIO

人民中國報道

3 · 1964





Printempo en Plena Disfloro

Foto de Hiaũ Je





Ora kamparo en la Baseno en Jili-rivero.

Foto de Hju Bang

# La Nordokcidento de Ĉinio



**M**ALFERMINTE la landkarton de Ĉinio, oni trovas en la nordokcidento ĝian plej grandan administran regionon, najbare de Kaŝmir en la sudokcidento, de Afganio, Sovetunio kaj la Mongola Po-

pola Respubliko en la okcidento kaj nordo, kaj de aliaj provincoj de Ĉinio en la sudo. Tio estas la Hingiang-a Aŭtonoma Regiono de Ujguroj.

Hingiang estas unu el la landlimaj regionoj plej foraj de la ĉefurbo Pekino. Tamen, ĝi havis sian prosperan pasintecon kaj havos ankoraŭ pli prosperan estontecon.

Antaŭ dumil jaroj, dum Han-dinastio, Ĉinio jam starigis ekonomian rilaton kun okcidentaj landoj tra Hingiang. Poste, kvankam Ĉinio eniris la periodon de pordferma politiko al la interkomercado kun aliaj landoj sub la longa regado de feŭdismo, tamen, la fama "silka vojo" en la historio pasis tra tiu ĉi regiono. Ankaŭ la kulturaj interfluo inter Ĉinio kaj la okcidento kaj inter Ĉinio kaj Hindio havis trafikon sur tiu neanstataŭebla vojo. Nun, sub la slogano "subtenu la konstruadon de la landlimaj regionoj", tiu ĉi fariĝas unu el la ĉefaj regionoj de subtenado, kaj vigle disvolviĝas en ĝi la socialisma konstruado.

## REGIONO VASTA KAJ RIĈA

Estas neniom troige priskribi Hingiang per la vorto "vastega". Ĝia areo estas pli ol 1,650,000 kvadrataj kilometroj, kun longeco de 1,900 kilometroj de la oriento ĝis la okcidento kaj vasteco de 1,500 kilometroj de la sudo ĝis la nordo. Ĝi konsistigas sesonon el la tuta areo de Ĉinio kaj egalas al ĉirkaŭ

45-obloj de tiu de Tajvan, la plej malgranda provinco de Ĉinio.

Se vi supreniras la Tiansan-montaron, kiu sin etendas trans la centra parto de Hingiang, vi povas birdokule vidi la tutan regionon — la altajn kaj kru-tajn Kunlun- kaj Algin-montarojn en la sudo, la serpentumantan Altaj-montaron en la nordo, kaj en la okcidento kuŝas Pamir-altebenajo, kiu estas nomata la firsto de la mondo.

En la regionoj sude kaj norde de Tiansan, ĉirkaŭataj de montaroj, formiĝas du vastaj basenoj, t. e. Tarim-baseno en la sudo kaj Ĝunger-baseno en la nordo. La tuta areo de tiuj du basenoj estas 880,000 kvadrataj kilometroj.

En tiuj grandaj montoj kaj basenoj abundas subtere petrolo, karbo, fero, oro, kupro, plumbo, volframo, mangano, barito, glimo kaj salo. Krome la jado de Kunlun-montaro estas tutlande fama jam de antikveco. Ankaŭ la petrolo de Klamaĵ kaj la karbo en ĉirkaŭajo de Urumĉi okupas gravan lokon en la ĉina industrio. Rezulte de geologia boresplorado dum la lastaj jaroj oni konstatis, ke Hingiang estas unu el la plej riĉaj regionoj de mineraloj.

En Hingiang estas stepo kun areo de ĉirkaŭ kvindek milionoj da hektaroj, kie abunde produktiĝas ŝafoj, ĉevaloj, bovoj kaj kameloj, kaj estas grava bazloko de bruto-produktaĵoj de Ĉinio. Ĝiaj arbaroj estas alia riĉfonto. Ĝia tuta areo kovras ĉirkaŭ 2,700,000 hektarojn. La arboj estas diversaj je kelkdekoj da specoj.

Estas ĉi tie pli ol okdek pli malpli grandaj riveroj. Kvankam ili ĉiuj estas enlandecaj, tamen ĉe iliaj trafluejoj formiĝis multaj basenoj kaj valoj, kie la klima-

to estas milda kaj humida, la grundo estas fruktodona kaj taŭga por kresko de tritiko, maizo, rizplanto kaj beto. Tre frue, jam en la sesa jarcento p. K. la popolo de Hingiang jam disvastigis inter si la bredon de silkraŭpoj kaj kultivadon de kotono. Post la Liberiĝo tie ĉi fariĝas unu el la gravaj bazlokoj de koton-produktado de Ĉinio.

Multaj famaj fruktoj de Ĉinio produktiĝas en Hingiang. Sur la kava tero de Turfan, 154 metrojn sub la marnivelo, abunde produktiĝas sensemaj vinberoj, en Ŝanŝan produktiĝas Hami-aj meĵonoj, en Jining — pomoj, en Kurle — piroj, kiuj estas delonge multe ŝatataj bongustaĵoj en la tuta lando.

### DUM LA REGADO DE LA REAKCIULOJ

Kvankam Hingiang estas vasta regiono kun tiom da riĉfontoj, tamen ĝi ne alportis feliĉon al siaj loĝantoj antaŭ la Liberiĝo. Tiam parolante pri Hingiang, oni nature ekpensis pri Siberio en Ĉara Rusio. Dum la regado de feŭdaj dinastioj, Hingiang de longe fariĝis ekzilejo de krimuloj. Kaj dum la reakcia regado de Kuomintang, Hingiang fakte fariĝis la infero sur la tero.

En Hingiang loĝas dek tri nacimalplimulto, el kiuj la ujuguroj konsistigas tri kvaronojn de la tuta loĝantaro. La aliaj estas la kazaĥoj, hanoj, huj-oj, ĥalĥazoj, mongoloj, taĝikoj, k.t.p. La Kuomintangaj reakciuloj unuflanke praktikis sian politikon de grand-han-nacia ŝovinismo kontraŭ la aliaj nacimalplimulto, aliflanke ili dissemis malakordojn kaj malamikecon inter la nacioj por faciligi sian regadon.

*“Ho, abunda rikolto denove!”*

Antaŭ la Liberiĝo en Hingiang troviĝis nur kelkaj metiejoj sed neniu moderna fabriko. Eĉ ŝraŭbo devis esti importita de ekstere. En la agrikulturo oni uzis tre primitivajn instrumentojn kaj metodojn. Multe de nacimalplimulto vivis kiel nomadoj. Tiam ĉiu seso da familioj posedis nur unu malnovtipan plugilon. En multaj distriktoj oni eĉ uzis lignajn plugilojn, kaj tute ne sciis forigi herbaĉojn kaj fekundigi la grundon per sterko. Senlimaj riĉfontoj de mineraloj ne estis ekspluatataj. Dek naŭ milionoj da hektaroj de kulturebla tero restis ne tuŝitaj de plugilo kaj fariĝis regno de sovaĝbovoj, sovaĝĉevaloj, cervoj, ursoj, ktp.

Tiam, la trafiko inter Hingiang kaj la internaj landpartoj estis tre malfacila. Eĉ unufoja korespondado inter urboj en Hingiang bezonis unu aŭ du monatojn. La leteroj estis transportataj de kurieroj kiel en la antikveco, eĉ telegramo devis esti transsendita per ĉevalo aŭ kamelo. Oni nomis ĝin “kamela telegramo”.

Pro malalteco de la produkta nivelo, kaj malfacileco de komunikado, la diversnaciaj loĝantoj en Hingiang eĉ ofte ne povis havigi al si la plej urĝe bezonatajn teon, salon kaj alumeton. Paŝtistoj devis elspezi cent kilogramojn da tritiko por akiri duonpecon da teo-briko, iuj eĉ donis kelkajn pecojn da ŝafofeloj por unu skatolo da alumeto.

### NOVA ASPEKTO

Nun en la vastaj regionoj sude kaj norde de Tianŝan-montaro regas prospero. Sur la senlime vasta

*Foto de Hju Bang*





stepo sin paŝtas gregoj de bovoj kaj ŝafoj. Sur la sablaj montetoj de la pasinteco nun kreskas verdaj arbaroj. Novaj urboj elrigardas en verdaj arbaroj. Ĉie viglas la vivo.

Dum la dek-kelkaj jaroj post la Liberiĝo, precipe post la fondiĝo de la Hingiang-a Aŭtonoma Regiono de Ujguroj, en la 1-a de oktobro, 1955, la popolanoj de ĉiuj nacioj en Hingiang subtenate de tiuj en la aliaj lokoj konkeris ĉiun obstaklon, ebenigis sablajn montetojn, entreprenis akvo-utiligajn konstruojn kaj kulturinte 1,860,000 hektarojn da virga tero, pligrandigis pli ol unuoble la areon de kulturita tero en la tuta regiono. El la vasta nove kulturita tero oni rikoltis pli ol 5.000.000.000 kilogramojn da greno kaj akiris grandan kvanton da kotono kaj oleodonaĵ rikoltaĵoj. La jarprodukta kvanto de kotono en Hingiang jam estas 20-oble pli multa ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj ĝi estas fama en la lando pro granda kvanto kaj bona kvalito.

En la agrikulturo kaj brutobredado de Hingiang, la akvo-utiligaj konstruaĵoj ludas gravan rolon. Nun, pli ol ducent akvo-rezervejoj de diversaj grandecoj jam estas konstruitaj. La areo de irigaciata kamparo pligrandiĝis 1.8-oble ol tiu antaŭ la Liberiĝo. Tio garantiis la riĉan rikolton de agrikulturo kaj brutobredado dum la lastaj kvar sinsekvaj jaroj. Dum la tri jaroj de 1960 ĝis 1962, sub la severa kondiĉo de senpluveco, la meznombra produkto-kvanto de greno plimultiĝis je 23% ol tiu de 1957, plimultiĝis je 87% ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. En 1963 ĝia agrikulturo kaj brutobredado denove akiris abundan rikolton. La tuta produkto-kvanto de greno plimultiĝis je 12% kompare kun tiu de 1962. Post la fondiĝo de popola komunumo la nombro de brutoj plimultiĝis je 50%, tio estas duoble pli multe ol tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Dum 1963 la nombro de brutidoj plimultiĝis je 6,700,000 kupoj ol tiu en 1962.

Nuntempe Hingiang jam havas tiajn industriajn branĉojn kiaj de ŝtalo, fero, kolor-metalto, petrolo, karbo, elektra energio, maŝino-fabrikado, cemento, ĥemio, ŝpinteksado, preparado de nutraĵoj, k.t.p. kaj jam povas produkti pli ol mil specojn de industriaĵ varoj, inkluzive de torniloj, generatoroj, metalurgiaj kaj minekspluataj ekipaĵoj kaj meĥanikaj agrikulturaj instrumentoj. Nun la produkto-valorado de la modernaj industriaĵ entreprenoj en 2½ tagoj jam egalas la tutjaran produkto-valoron dum la komenca periodo post la Liberiĝo.

Sekve de la rapida disvolviĝo de produktado, ankaŭ la vivnivelo de la popolo rapide altiĝas. La kvanto de pomalgrande venditaj varoj en 1962 estas 3.8-oble pli granda ol tiu en 1950. La vendkvanto



*Gestudentoj de la tria lernjaro de la Hingiang-a Medicina Instituto praktike lernas en ĝia dependa hospitalo.*

*Foto de Ŝeng Giĵun*

de kelkaj ĉefaj varoj kreskas en obloj, ekzemple tiu de sukero pligrandiĝis 8.9-oble, teo — 7.2-oble, koton-teksaĵoj — 6.7-oble kaj tiu de lan- kaj silk-teksaĵoj ŝatataj de ĉiuj nacioj en Hingiang, dum la periodo de 1958 ĝis 1962 plimultiĝis kvaroble ol tiu antaŭ kvin jaroj. Dum la pasintaj dekkelkaj jaroj la prezoj ne nur estas stabilaj, sed grade malaltiĝas. La prezoj en 1962 estis jam 95.6% plimalaltaj ol tiuj en 1950.

Antaŭ la Liberiĝo paŝtisto povis interŝanĝi unu ŝafon nur por unu teo-briko aŭ 16 metroj da blanka kotonteksaĵo. Sed en 1962 unu ŝafo egalvaloris jam 6.38 teo-brikojn aŭ 53.35 metrojn da kotonteksaĵo. La ŝtato subvencias la transportadon de la industriaĵ varoj liverataj al la foraj lokoj ĉe la landlimo, por

*Hingiang estas riĉa produkteto de bonrasaj ĉevaloj fame konataj sub la nomo Jili-ĉevalo.*

*Foto de Hju Bang kaj Van Fuzun*



ke iliaj prezroj ne estu pli altaj ol tiuj en aliaj distriktoj de Hingiang pro malfacila trafiko.

Nun, ĉiu paŝtista familio en la aŭtonoma regiono havas siajn ĉevalojn por rajdi kaj melkobovinojn kaj ŝafojn por manĝi, sume pli ol 4,500,000 en la tuta regiono. Samtempe ankaŭ la ŝparmono de la loĝantoj en urboj kaj vilaĝoj rapide plimultiĝas. En oktobro, 1963 la enbanka mondepono de la diversnaciaj popolanoj kreskis 23-oble ol antaŭ dek jaroj.

Ankaŭ la malmultiĝo de la anoj de la nacimalplimulto jam ĉesis. Ekzemple, en 1949 la tuta kazaha-nacia loĝantaro en la Altaj-a subprovinco nombriĝis malpli ol 50,000, sed nun ĝi atingis 110,000. La loĝantaro de la tuta regiono de Hingiang kreskis je 44% ol en la komenca periodo post la Liberiĝo.

## KULTURO KAJ SANO

Ankaŭ la kulturoj kaj sanitaraj laboroj en Hingiang akiris grandajn sukcesojn. Nun en ĉiu gubernio estas mezlernejoj, en ĉiu produkta brigado estas elementaj lernejoj, kaj cetere kelkaj superaj lernejoj establiĝis. Antaŭ la Liberiĝo tie funkciis nur naŭ mezlernejoj, sed nun 300. La nombro de gelernantoj en la mezgradaj kaj elementaj lernejoj jam atingis pli ol 957,000. Dum la pasintaj 14 jaroj la gelernantoj finintaj la kursojn de mezlernejo aŭ elementa lernejo jam nombriĝas 790,000. Tio donis al la edukado en Hingiang novan aspekton.

Por krei bonan studan medion por la diversnaciaj junuloj, la popola registaro asignis grandan sumon da mono por konstrui domojn de lernejoj kun laboratorioj ekipitaj per diversaj instrumentoj, specimenoj kaj modeloj. Krome, la ŝtato ankaŭ eldonas grandkvanton de libroj kaj lerniloj en la lingvoj de nacimalplimulto. Dum la 14 jaroj la Hingiang-a Popola Eldonejo sola eldonis 2545 librojn, lernolibrojn kun 37,990,000 ekzempleroj en kvin naciaj lingvoj, nome la ujugura, kazaha, mongola, sibo-a kaj ĥalfaza. Geknaboj de la ujugura, kazaha kaj mongola nacioj povas lerni per libroj en sia propra nacia lingvo.

Por eleduki kadrojn el la nacimalplimulto, nia registaro ĉiujare sendigas multe da iliaj junuloj al fabrikoj, lernejoj, hospitaloj k. a. en la grandaj urboj kiaj Pekino, Ŝanhajo, k. s. por studado. Miloj kaj miloj da diplomitaj nacimalplimultaj junuloj revenis al Hingiang kaj fariĝis gvidantoj aŭ ĉefaj kadroj en diversaj laborfrontoj.

La popola registaro multe zorgas pri la sano de la nacimalplimulto. La speciala sumo por disvolvi la sanitarajn entreprenojn en Hingiang dum la pasintaj 14 jaroj jam atingis pli ol 131,000,000 juanojn. Antaŭ kvin jaroj la malsanoj de variolo kaj sifiliso, multjare suferigintaj la popolon de Hingiang, estis



radikale eliminataj, kaj infekta kaj parazita malsanoj estis preventitaj. Nun fundamente jam formiĝis reto de kuracejoj en la kamparo, kun la guberniaj hospitaloj kiel centroj. La sanitaraj organizaĵoj en 1962 estis 34-oble pli multe kompare kun tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo kaj la nombro de malsanulaj litoj plimultiĝis ĉirkaŭ 33-oble. Sanitaraj teknikistoj plimultiĝis 53-oble, el kiuj la altaj teknikistoj plimultiĝis 142-oble. Krome, por la nacimalplimulto oni edukis multajn sanitarajn laborantojn.

La vorto "Nordokcidento" antaŭ nur iom pli ol dek jaroj ankoraŭ estis sinonimo de "vasta dezerteco" kaj "postigiŝinteco". Sed nun ĝi akiris jam tute novan signifon de prospero kaj multa promeso.

*SUPRE: La popola komunumo "Ruĝa Lumo" sude de Taklamagan-dezerto venkis la sabloventegon kaj sekegecon per sia kolektiva forto kaj konstruis sian novan vilaĝon.*

*SUBE: Ĝi kreis oazon en la dezerto per konstruo de irigacia kanalo.*

*Fotoj de Song Ŝiging*







*Diversnaciaj komunumanoj gaje kantas kaj vigle dancas post laboro.*

*Foto de Hju Bang kaj Vang Fuzun*

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

### **NOVA POEMARO DE K-DO MAŬ ZEDONG**

En la novjara tago ĉijare eldoniĝis en Pekino nova eldono de Maŭ Zedong: Poemaro.

La poemaro enhavas 10 poemojn nove publikigitajn, kaj al la 27 antaŭe publikigitaj poemoj, k-do Maŭ Zedong faris kelkloke ŝanĝojn.

Ĝi estas eldonita samtempe de du eldonejoj en 6 malsamaj eldonoj kaj 80,000 ekzempleroj jam estas forvenditaj. Ĝi estas tiel ŝatata de la legantoj, ke la 18,000 ekzempleroj destinitaj por pekinaj librejoj elĉerpiĝis nur en du tagoj, kaj miloj da malfruiĝintoj devas mendi la dua eldonon.

### **INGENIEROJ EL LABORISTOJ**

Ĉiam pli da spertaj laboristoj estas promociitaj al inĝenieroj en nuna Ĉinio. Antaŭ nelonge en la Ferŝtala Kompanio en Baŭtoŭ pli ol 100 spertaj laboristoj fariĝis inĝenieroj kaj specialistoj. Ankaŭ en Kantono 164 malnovaj laboristoj kaj industriaj administrantoj devenintaj el laboristoj fariĝis inĝenieroj aŭ teknikistoj.

Plejparto el ili laboris pli ol 10 jarojn en siaj laboroj kaj iuj eĉ pli ol 30 jarojn. Post fondiĝo de la popola reĝimo ili ne nur rapide progresis sur sia laborposteno, sed ankaŭ havas la eblon viziti post-laboran lernejon aŭ lerni en altaj teknikaj lernejoj dum kelkaj jaroj salajrate. Tio donis al ili la necesajn kulturajn kaj teknikajn sciojn de inĝenieroj.

### **INFANO VOJAĜIS SOLA AEROPLANE**

Eta Lin Ĝi, unu-kaj-duonjara infano vojaĝis aeroplane je la 1-a de marto, ĉijare sen akompananto de Hi-an, la ĉefurbo de Ŝenhi-provinco al Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco kun distanco de pli ol 1,200 kilometroj.

La geavoj de la infano loĝas en Kunming. Ili tre sopiris vidi la infanon, sed la gepatroj laborantaj en Hi-an ne povis ĝin akompani en la vojaĝo. Tial ili ĝin konfidis al la ĉina civila aera servo.

Kiam la aeroplano atingis Kunming, konduktorino Maŭ Guejlan ĝin portis el la aeroplano kaj ĝin transdonis al ĝiaj parencoj tie ĝin atendantaj. La konduktorino diris, ke estis jam tri etuloj kiuj vojaĝis tiamaniere per tiu linio.

# ARMEANOJ—Terkulturaj Pioniroj

**ĈIAM**, kiam mi sidante en kvieto rememoras pri mia vizito al Hingiang, mian koron longe okupas la neforgeseblaj armeanoj, kiuj pioniras sur la dezerto miljara.

En Hingiang sin trovas trupo, kies anoj ĉiam vigle laboradas spite al ĉiaj malagrablajoj kaj krue-lajoj de la vetero sur la senhomaj stepoj dum la tuta jaro. En la pasintaj pli ol dek jaroj, ili finkonstruis irigaciajn kanaletojn kun suma longeco de 43,000 kilometroj, kulturis 720,000 hektarojn da virga tero, establis 173 farmojn, akiris abundan rikolton de milionoj kaj milionoj da kilogramoj da greno, kotono, oleproduktaj rikoltaĵoj kaj betoj, kaj establis multajn fabrikojn unujn post aliaj. Nun en la vasta regiono de Tarim- kaj Ĝunger-basenoj, kie antaŭe etendiĝis vasta flava sablejo kun terura sekegeco, jam aperis novaj oazoj kun interplektitaj kanaletoj kaj protektantaj forstozonoj, kaj sur tiuj oazoj stariĝis nun novaj urboj. Tiu ĉi trupo estas la Produkto-konstrua Korpuso de la Hingiang-a Garnizona Regiono de la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio.

## EN LA BASENO DE MANAS-RIVERO

Ni faris kelktagan viziton al la korpusaj farmoj en Manas-baseno, norde en Hingiang. Manas estas

la plej granda rivero en norda Hingiang. Kruta estas ĝia riverujo kun abundo de gruzoj. Dum la akvomanka periodo la fluo kaŝiĝis en la tero kaj oni neniel povis ĝin utiligi, sed kiam torentis pluvakvo, ĝi ofte faris katastrofon de inundo. Antaŭ la Liberiĝo, nur ĉe la supra fluejo de la rivero sin trovis 30,000 hektaroj da agroj dum la pli vasta parto de la baseno restis miljare virga stepo. En la printempo de 1950, la Liberiga Armeo venis al tiu ĉi regiono. La armeanoj multe klopodis kulturi la virgan teron kaj ĝin reformi en fruktodonajn kampojn per konstruoj akvoutiligaj. En 1952, ili komencis plenan reformadon de Manas-rivero. Kaj post malfacila strebado en la pli ol dek jaroj, nun 6 montvalaj riveroj kaj pli ol dek fluetoj kun Manas-rivero kiel la ĉefa jam disfluas en diversajn irigaci-regionojn, pasante tra multaj kanaletoj kun suma longeco de pli ol dudek mil kilometroj kaj akvorezervejoj grandaj kaj malgrandaj racie dislokitaj. Ili establis tie pli ol 30 grandajn mekanikigajn farmojn. Ekde 1958 ĝis nun oni rikoltis sume 925,000 tunojn da greno kaj pli ol 40,000 tunojn da kotono. Tiu baseno fariĝis jam la ĉefa produktejo de greno kaj kotono en Hingiang.

*Armeanoj de la Hingiang-a Produkto-konstrua Korpuso faras pioniran laboron sur la virga tero de Tarim-baseno.*






## LA JUNGADO DE LA "SENBRIDA ĈEVALO"

Poste ni venis al Tarim-baseno en suda Hingiang. En la baseno sin trovas la plej granda dezerto de Ĉinio—Taklamagan-dezerto, kaj la plej granda enlanda rivero de Ĉinio—Tarim, kies nomo signifas en la ujugura lingvo "senbrida ĉevalo". La baseno antaŭe estis senhoma dezerto. En la 90-aj jaroj de la 19-a jarcento, la fama sveda esploristo Sven Hedin, kiu estis sperta en esplorado pri dezertoj, alvenis al Jeĉeng—la limurbo okcidente de Taklamagan-dezerto kun sia plano utiligi tiun urbon kiel bazon kaj vojaĝi orienten tricent kilometrojn kaj transiri la anguleton de Tarim por atingi Hetian-valon. Liaj kamaradoj senescepte pereis survoje kune kun siaj kameloj kaj li mem bonŝance atingis Hetian sen havaĵo. Li poste ĝin priskribis en sia verko *Vojaĝo tra la Interna Parto de Azio*: "Vere terure! Ĝi estas loko, kien neniu vivestajo povas eniri, maro de morto, terura maro de morto!"

En la printempo de 1958 la Hingiang-a Produkto-konstrua Korpuso de la PLA trapasis la dezerton longan je 200 ĝis 300 kilometroj kaj marŝis profunde en la basenon de Tarim-rivero kaj tie konstruis vicajn da akvorezervejoj, kanaletojn kaj ŝirmajn forstojn. Finfine ili jungis la superakvegion, enkatenigis la furiozajn sabloventegojn, konkeris salalkalecon de la tero kaj establis pli ol dek korpusajn farmojn. En la lastaj jaroj ili akiradis abundajn rikoltojn kaj en agrikulturo kaj en bestobredado.

Foto de Vang Fuzun



Irigacia kanalo kaj por la armeanoj kaj por la civiluloj.

Foto de Liu Lang



*K-do Vu Giĉan, partopreninto de la Longa Marŝo, venis kun sia tuta familio por kulturi la virgan teron en Tarim. Nun li estas la estro de la Dektria Branĉo de la ŝtata farmo "Triumfo".*  
Foto de Vang Fuzun

Kiam nia aŭtomobilo veturis tra tiu areo, okcidente ekster la fenestroj prezentiĝis senlima dezerto, kiu donis brulan varmegon sub la fajra suno, dum oriente vidiĝis verda vastajo. La vicaj de sablojujubarboj kaj poploj aspektis kiel verda Granda Muro, kaj interne de ĝia sino disetendiĝis oazoj kun multaj kanaletoj kaj kampoj. Tarim-rivero—la "senbrida ĉevalo" estis fine jungita de la heroo trupo.

## PROSPERAS BRUTOBREDADO KAJ ABUNDAS FRUKTOJ

En la farmoj, kiujn establis la korpuso, oni ne nur energie klopodas por disvolvi la produkton de greno, kotonoj kaj oleproduktaj rikoltajoj, sed ankaŭ starigis multajn grandajn modernajn bestobredejojn por la bredado de ĉevaloj, bovoj, ŝafoj, porkoj, kokinoj, anseroj, cervoj, damaoj, cignoj kaj anasoj. Tien oni enkondukis multajn bonajn speciojn; ekz. la svisa ŝafo kaj pekina anaso jam grandnombre generiĝis tie. Laŭ la statistiko de 1962, la brutaro jam nombriĝis je 1,380,000 kapoj kaj sume 99,000,000 kilogramoj da viando kaj 11,500,000 kilogramoj da lano produktiĝis.

La korpusaj farmoj ankaŭ grandskale kulturis diversspecajn legomojn kaj fruktojn de bona kvalito. Ili kultivis sume 4,400 hektarojn da fruktoĝardenoj kaj kreis arbarojn sur areo de 11,000 hektaroj. En iliaj fruktoĝardenoj kreskas

fruktarboj de famaj specioj de persikoj, abrikotoj, piroj, prunoj, pomoj kaj vinberoj, kaj ili jam komencis doni fruktojn multnombre.

## LA UNUAJ MODERNAJ INDUSTRIOJ EN HINGIANG

La unuaj modernaj industriaj entreprenoj en Hingiang estis starigitaj de tiu ĉi korpuso. En la pasintaj dekkelk jaroj ili establis kelkcent entreprenojn de ŝtala, karbomina, maŝina, elektra, ŝpinteksa, manĝaĵa kaj kemisterka industrioj. La produktaĵoj de tiuj fabrikoj sufiĉas ne nur por kontentigi la bezonojn de la membroj de siaj propraj farmoj, sed ankaŭ por multe provizi la najbarajn urbojn, kaj kelkaj specoj de ili eĉ estis eksportitaj eksterlanden. Nun multaj fabrikoj jam estis transdonitaj sub la administradon de la lokaj aŭtoritatoj kaj ili fariĝis efektive la framo kaj fundamento de la Hingiang-a industrio.

Dank' al la establiĝo de la farmoj kaj fabrikoj, aperis unu post alia novaj urboj sur la dezerto milmiljara. En tiuj novaj urboj estas interplektitaj ebenaj stratoj, kun bele aranĝitaj magazenoj, kluboj kaj librejoj, bone ekipitaj hospitaloj kaj sanatorioj, elementaj kaj mezgradaj lernejoj kaj universitatoj. La Agrikultura Universitato en Tarim-baseno jam disvolviĝis en superan lernejon kun ok fakoj.

Por faciligi la komunikadon inter la farmoj kaj urboj, la armeanoj de la korpuso laboradis sur la altaj montoj kaj konstruis multajn ŝoseojn, kiuj donis novan trajton al la tiea transportado.

## MULTAJ BONOJ AL LA POPOLANOJ DE HINGIANG

Dum la vizitado, mi informiĝis interalie pri la heroajoj de la armeanoj en helpado al la popolanoj de Hingiang en la konstruado de ilia hejmloko. Ili donis grandan helpon per homforto, tekniko kaj materialoj al la diversnaciaj terkulturistoj kaj paŝtistoj. Por eduki la indiĝenajn teknikistojn, la korpuso sendis siajn spertajn teknikistojn longdaŭre loĝi en la komunumoj por tie instrui teknikon kaj samtempe ankaŭ akceptis indiĝenajn kadrojn de diversaj nacioj en la teknikajn kursojn de la farmoj por lernigi al ili teknikon. Ĝis 1962 la korpuso edukis jam pli ol 30,000 teknikistojn el nacimallimulatoj kaj transdonis al la indiĝenoj kelkdek mil hektarojn da kulturita tero. La areo de la kampoj, kiujn la armeanoj plugis, semis kaj rikoltis sen postulo de kompensoj por la diversnaciaj terkulturistoj, sume superis 133,000 hektarojn. La kvanto de diversaj bonspesaj grensemoj donacitaj aŭ interŝanĝitaj sume atingis 5,000,000 kilogramojn. Ili ankaŭ nepagite konstruis por la indiĝenoj loĝejojn, lernejojn kaj kinejojn, kies totala plank-areo estis 30,000 kvadrataj metroj. Krome, por

*Abunda rikolto de kotono en Tarim-baseno en 1963.*

*Foto de Vang Fuzun*






kontentigi la irigacian bezonon de la terkulturistoj, la armeanoj fosis por ili kanaletojn kun totala longo de pli ol 600 kilometroj kaj per tio ebligis la irigaciadon de 1,330,000 hektaroj da tero.

La armeanoj zorgas ankaŭ pri la sano de la nacimalmultoj. La kuracistoj de la korpusaj farmoj vizitadis preskaŭ ĉiujn lokojn sude kaj norde de Tianŝan-montaro por doni bezonegatajn helpojn. Ili fervore plenumis pli ol cent mil senpagajn kuracadojn al diversnaciaj popolanoj.

Ĝuste pro tio, la korpuso estas altestimata kaj amata de la nacimalmultoj en Hingiang. Kaj dum la vizitado mi aŭdis jenan diron de multaj komunumanoj: "En la pasinteco la armeanoj kutimis nur postuli manĝon kaj veston de la popolanoj, sed nun la armeanoj de Prezidanto Maŭ sin okupas mem pri produktado kaj eĉ tuforte nin helpadas." Sed fakte la popoloj en Hingiang vere elkore helpis kaj subtenis la korpuson. En la komenca periodo de la produktado kaj konstruado, ili ne nur instruis al la korpuso siajn teknikojn kaj sperton, kaj donis al ĝi herbejon, akvofonton kaj brutojn, sed iafoje eĉ riskis siajn vivojn por savi la havaĵojn kaj kunbatalantojn de la korpuso. Ili tiel subtenas, prizorgas kaj amas unu la alian. Estas ne mirinde ke ili ofte uzas la vortojn "kiel fiŝo en akvo" por esprimi la intimecon de iliaj interrilatoj.




*SUPRE: La Dua Brigado de la Unua Branĉo de la farmo "Triumfo" uzas kombajnon por rikolti.*

*MEZE: Han-naciaj armeanoj helpas al uĝuraj komunumanoj sunumi tritikon. Ili laboras en granda intimeco kvazaŭ samfamilianoj.*

*SUBE: Aleo kaj arbidaj bedoj de la Forstiga Brigado de la Dekkvara Farmobranĉo.*

*Fotoj de Vang Fuzun*



*Pleje Dolĉa  
Estas Nia Vivo*

—NOVA UJGURA  
POPOLKANTO—



*Pleje dolĉas la turfan-vinberoj\*  
dank' al trink' el put-riveroj\*\*.  
La hami-melonoj\* gustas kiel mielo  
dank' al nutro de la sabla tero.*

*Pleje dolĉas nia himno-kanto  
pri feliĉo de la hejma lando.  
Pleje dolĉa estas nia vivo  
dank' al komunuma kolektivo.*

*Antaŭe Kiam Mi Trapasis  
Tie Ĉi*

LI GINTING

*Antaŭe kiam mi trapasis tie ĉi,  
soifis kaj l' ĉeval' kaj mi.  
Ni devis maĉi herbojn por nin helpi.  
Se kampoj tiam estis,  
en ili korvoj nestis.  
La mastro al mi diris:  
"Konstruon de kanalo  
la Komunum' decidis."*

*Ĉijare kiam mi trapasas tie ĉi,  
jam trinkas la ĉevalo el klara kanalo;  
mi volas bani min en ĝi.  
Mil mil hektaroj da plantaĵoj  
verdas kvazaŭ vasta maro.  
La mastro kore ridas:  
"La Komunum' je fortoj riĉas,  
por formi fluon nia ŝvit' sufiĉas."*

*Sopiro al  
Pekino*

—NOVA POPOLKANTO  
DE ĈJANG-NACIO:—



*Starante sur montego mi ekprovas  
rigardi al Pekino, sed ne povas  
ĝin vidi, pro l' montaro sur la vojo.  
sed bari mian koron ĝi ne povas.*

Esperantigis LAŬLUM

\*Turfan kaj Hami estas famaj produktoj de vinberoj kaj melonoj en Hingiang.


\*\*Duosubteraj kanaloj kondukantaj akvon de puto al puto por irigaciado.

‡Nacimalplimulto en la sudokcidenta parto de Ĉinio.

Bonrasaj melkbovinoj devenintaj de diversaj lokoj en- kaj eksterlandaj reproduktiĝas ĉe la bordoj de Tarim-rivero.

Foto de Vang Fuzun

Bestobredejo de la Unua Divizio de





HIN HUA:

## La "Nokta Foiro" de Teknikaj Kunlaboroj

VESPERE. Kiam falis la nokta kurteno, tuj vigliĝis la Halo de Produkta Tekniko en la domo de la Kultura Palaco de Ŝenjang. La ĉeestantoj aŭ trikvinope konversaciis en intimeco, aŭ dronis en desegnado kun kapoj klinitaj aŭ aŭskultadis apudstarante. Jen estis sceno en la "nokta foiro" de la teknikaj kunlaboroj kiu okazas tie ĉiusemajne.

Unu el la respondeculoj pri la teknikaj kunlaboroj estis la veterana laboristo Jang Delin el la Ŝenjang-a Fabriko de Alt-premaj kaj Mez-premaj Valvoj. Li informis min, ke inter la pli ol 400 ĉeestantoj estas labormodeloj, veteranaj kaj junaj laboristoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj profesoroj de kolegioj kaj universitatoj.

Ekde sia inaŭguro en la vintro de 1961 la semajna "nokta foiro" daŭris jam du jarojn. Ĉu en frosta vintro aŭ varmega somero, oni regule alvenas en ĉiu marda vespero el diversaj lokoj spite venton aŭ pluvon. Tie ĉi oni lekcias, aŭskultas, aŭ elmetas demandojn pri teknikaj malfaciloj trafitaj dum produktado kaj petas helpon de la aliaj aŭ sin okupas ekskluzive pri solvado de alies malfaciloj. Pere de interŝanĝoj de spertoj kaj kunlaboroj oni kune klopodas solvi la malfacilajn demandojn en produktado.




Teknikistoj el diversaj fabrikoj studas la modelon de la ĵus elpensita muelmaŝino. Foto de Gia Ĉengbin

La granda salono kaj la tri aliaj ĉambroj de la Halo de Produkta Tekniko estis plenaj de laboristoj kaj teknikistoj kun granda fervoro de interhelpo laborista. En la centro de la salono, grupo da oficistoj kaj laboristoj kolektiĝis ĉirkaŭ unu tablo apud kiu estis nigraj trembrilaj tornotranĉilaj klingopecoj. Ili estas produkto de la veterana laboristo Ju Guofu de Hinhua-fabriko de Elektraj Maŝinoj post kelk-monata provado en kunlaboro kun aliaj laboristoj. En julio aŭ aŭgusto de la pasinta jaro, kiam Ju Guofu ĉi tie partoprenis en la teknika esplorado, li informiĝis ke la klingopecoj produktitaj de la klingofabriko ne atingis la normojn difinitajn de la ŝtato pri koloro kaj kvalito. Li komencis kaŝe studi pri la problemo. Poste li dufoje vizitis la klingofabrikon kaj utiligante la dimanĉan libertempon sukcese plibonigis la procedon kaj recepton kune kun aliaj laboristoj. Nun oni jam povas produkti klingopecojn en koloroj ruĝa, verda, flava kaj griza kaj ankaŭ ilia kvalito pliboniĝis. Hodiaŭ venis al li kelkaj junaj laboristoj el Liaŭŝen-a Klingofabriko, kiuj montris siajn plibonigitajn klingopecojn al Ju Guofu kaj petis lian helpon ke li kun-

Agrokulturo en Tarim.

Foto de 'Su Gjunhuj

En la Aŭgusto-unua Ferŝtala Uzino de la Hingiang. Foto de Vu Ĉunĝan



portu tiujn klingojn al sia fabriko por fari detalan ekzamenon kaj analizon kaj vidu ĉu la kvalito estas bona.

Jen en la salonon envenis Cuj Fugaŭ, la vicestro de la Kombinita Prilaborejo de la Kvara Konstrua Kompanio de Ŝenjang kun kelkaj maljunaj laboristoj. Ili kunportis kun si tri fertubojn kaj ilin metis sur la tablon. Tuj kolektiĝis tien multaj homoj. Iuj ekprenis la fertubojn por rigardi dum aliaj elmetis demandojn pri ili. La fertubo estis specimeno de mortar-ŝprucigilo farita de la laboristoj mem. Ĝi povas stuki anstataŭ la manoj de masonisto kaj altigi la laborefikon. Sed la mortero elspuita ne povas formi nebulon kaj tiel estigi simetrian stuktavolon. Aŭskultinte la vortojn de Cuj Fugaŭ oni konkure donis konsilojn por bonigi la ilon. La laboristodevena inĝeniero Ma Hongkian el la Fabriko de Malalt-tensiaj Komutiloj proponis: "Rektigu la blovan aperturon!" La veterana laboristo Hju Kinki el la Kemia Instituto de Ŝenjang diris: "La bekon oni faru reguligebla kaj la aperturon ŝanĝu en helicforman." Fervore oni proponis tiajn kaj aliajn plibonigojn kaj post nelonge jam multaj plibonigaj projektoj estis elmetitaj. Fine Ma Hongkian sin klinis al la tablo, faris projektan desegnon por Cuj Fugaŭ kaj diris: "Ĝin provu reveninte; se leviĝus problemoj, venu al ni denove."

Kiel en ĉiuj aliaj mardaj vesperoj, tiuvespere laŭkutime alvenis multaj novaj petantoj kaj helpantoj al la Centro kaj tie ekestis inter si multaj novaj interrilatoj de kunlaboroj.

Enirinte la ĉambron sude de la salono mi ekhavis tute novan impreson. Kvieteco regis en la ĉambro kaj sur la podio profesorasistanto Ĝang Jancaj lekiis pri la teknologio de precizaj fabrikadoj. Antaŭ la podio estis granda amaso da aŭskultantoj kun neniu seĝo vakanta kaj ekstere, eĉ la koridoro kaj la fenestroj estis plenaj de aŭskultantoj. Tie kunlernas

## Ĉinaj Proverboj


1. Sen ĝusta orientado, vi vojeraros eĉ en la tago.
2. Malutilas por via reputacio viaj misagoj, ne alies kalumnio.
3. Se vi tigridon dome bredos, sur vin ĝi iam sin ekjetos.
4. La lupoj sin ne ŝanĝis, kvankam vian ŝafon ĝi ne manĝis.
5. Por havi pri vi ĝustan vidon, spegulen montru ne nur ridon.
6. Defendi kritikendajn signifas sterki herbaĉon.

diligente majstroj kaj disĉiploj, patro kaj filo kaj geedzoj. Ĉiuj atente aŭskultis kaj skribis, timante preterlasojn de iu ajn vorto aŭ frazo.

La postlabora teknika kurso de la Halo fariĝis jam libertempa lernejo por la laboristoj. Ekde sia inaŭguro ĝi estas fervore subtenita de la laboristoj. Nun ĝi konsistas el lecionoj pri tornotranĉiloj, elektrotekniko, riparado de ilmaŝinoj k. a. Inter la lekciantoj estis laboristoj, inĝenieroj kaj docentoj. Kaj en la pasintaj du jaroj ĝi estis vizitata je pli ol 50,000 homfojoj.

Tempo pasis nerimarkite. Tra la fenestroj de la Kultura Palaco oni povis vidi ke en la nokta ĉielo estas densaj steloj. La hormontrilo de la horloĝo baldaŭ atingis la naŭan, sed la aktivuloj de teknika kunlaboro ankoraŭ profunde dronis en fervoraj konversacioj du- aŭ triope kaj neniu volis foriri.

La nove konstruita pivoteca kluzo akvokonduka sur Manas-rivero. Foto de Liu Lang





# ĈE LA BORDOJ DE JILI-RIVERO



*La urbo Jining ĉiam pli beligas.*

*Foto de Vu Ĉunĝan*

*“En Hingiang, loko bela kaj bona,  
Jili estas la plej fruktodona.”*

De longe mi deziris viziti nian riĉejon — la Jili-a Aŭtonoma Subprovinco de Kazaĥoj, kaj tion mi sukcesis fari antaŭ nelonge. Sur la ebenejo ĉe la baseno de Jili-rivero mi vagis turisme pli ol du monatojn. Mi vizitis la pitoreskan urbon Jining, informiĝis pri la ŝanĝiĝo en agrikulturo kaj bestbredado de la kazaĥoj, kaj vidis ilian ĝojan vivon sur la stepo.

## Jining

Jining estas la ĉefurbo de la Jili-a Aŭtonoma Subprovinco de Kazaĥoj, konata kiel parkourbo. Vicoj da altaj poploj formis en ĝi verdajn koridorojn laŭ stratoj. La sunaj radioj kribriĝas tra la foliaroj kaj dekoracias la vojojn per nuanceriĉaj petolaj sunetoj. Susuras supre la folioj en vento. La kristalaj fluoj de la kanaletoj murmuradas tra la tuta urbo, kvazaŭ sennombraj trembrilantaj silkrubandoj, kiuj kunligas ĉiujn angulojn de Jining. Fruktoĝardenoj staras unu apud alia ĉirkaŭ la urbo.

En la centro de la urbo etendiĝas kvar larĝaj, ebenaj asphaltitaj stratoj. Dekoj da grandaj etaĝdomoj kaj la administrejoj, lernejoj, hospitaloj, poŝtoŝtationoj, fabrikoj, bankoj, kinejoj, teatroj, kluboj, sporthalo, legejoj k. a. donis al ĝi modernan aspekton. Dum la labortagoj la urbo vidiĝas bela kaj kvietita. Sed dum feriaj tagoj ĝi subite vigliĝas, ĉe la cent dudek ses butikoj kaj magazenoj kaj la sesdek kvar restoracioj senĉese en- kaj el-iras klientoj. La geknaboj de pluraj nacioj legas kaj ludas en la Palaco por Infanoj. En la parkoj kaj densaj arbaroj, centoj da

ekskursantoj aŭskultas deklamadon de versaĵoj kaj belajn muzikojn.

La loka historiisto Jiminlis diris al mi: “Antaŭe oni nomis Jining per ‘nining’ (t. e. kota). Ĉar tiam ekzistis neniu etaĝdomo, neniu gruz-pavimento sur la pli ol cent stratoj larĝaj kaj mallarĝaj. Oni loĝis en senfenestraj terdomoj nur kun lukoj, kaj la koto en la stratoj eĉ povis malebligi la trairon de azenoj.”

Antaŭe Jining estis urbo de konsumado. Krom kelke da simplaj metilaborejoj, tiam ekzistis nur du fabrikoj: unu elektrejo kaj unu ledpreparaĵejo. Sed nun, sur la bordoj de la serpentumanta Jili-rivero aperis nova kvartalo de industrio. Ĉi tie estas ŝipkonstruejo, lan-ŝpinteksejo, paperfabriko, ledpreparaĵejo ktp., kaj ili donas novajn trajtojn al la urbo malnova.

## Kiel Vivas la Kazaĥoj?

Antaŭe mi aŭdis, ke la kazaĥa nacio ankoraŭ konservas sian socian sistemon de klanoj kaj triboj, ĝi vivas kiel nomado kaj por sin vivteni la plimulto de la paŝtistoj devis labori kiel dungitaj paŝtistoj de la brutoposedantoj. La greno tie bezonata estis ĉefe liverata de aliaj lokoj. Kiel ĝi nun statas?

Al ĉi tiu demando la plej simpla respondo estas: “Ĉio ŝanĝiĝis.” En tiu regiono loĝata ĉefe de kazaĥoj, ne nur delonge likvidiĝis la ekspluatado fare de la brutoposedantoj, sed ankaŭ disvolviĝis la bestbredado kaj la agrikulturo.

En la tuta subprovinco nun la nombro de dombestoj estas 1.6-oble plimulta kompare kun tiu de 1949. Precipe en la lastaj tri jaroj oni havis sinkvajn riĉajn rikoltojn, la vivipovaj bestidoj ĉiujare



Pom-ĝardeno de la komunumo "Ruĝa Stelo" en Jining.

Foto de Hju Bang



Diversnaciaj aĉetantoj en la magazeno de Jining. Foto de Vu Ĉunĝan

sin nombras sume je pli ol du milionoj kaj kvincent miloj. La kulturita areo de la grenkampoj pliiĝis pli ol unu-oble en komparo kun tiu de 1949, kaj en la lastaj tri jaroj la mezkvanto de greno por ĉiu vilaĝano atingis 400 ĝis 500 kilogramojn. Nun en la tuta subprovinco jam populariĝis la elementa klereco, kaj ankaŭ la nombro de la lernantaj liceanoj pligrandiĝis je pli ol dek obloj kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Kaj samkvante pliiĝis la nombro de la medicinaj funkciuloj. Rezulte de tio, la loĝantaro de ĉi tiu distrikto plimultiĝas ĉiujare en rapida ritmo. Statistiko montras, ke dum la dek jaroj de 1949 ĝis 1959 la loĝantaro plimultiĝis je 24.7 procentoj.

### Transformiĝis la "Amara Vilaĝo"

En la vilaĝo Juzi de Turfan, ne malproksime de la norda bordo de Jili-rivero, mi propraokule vidis la kamparan vivon de ĉi tiu regiono. La vilaĝo estas relative granda. Tra ĝi iras granda vojo, ĉe kies ambaŭ flankoj situas multaj pomĝardenoj. Inter la bonordaj spaliroj de la pomarboj montriĝas vicoj de ruĝaj rozoj. Trans la vojo estas nova vilaĝo, kaj tie la domoj estas en bonordaj vicoj kaj similas al loĝejoj de la urbo. Antaŭ kaj malantaŭ la domoj tie kaj tie staras tremoloj, kaj ĉe ambaŭ flankoj de ili fluas klaraj kanaletoj. Kaj brue petolas ĉe ili kokoj kaj anasoj.

Mi eniris la loĝejon de iu komunumano. Mi vidis, ke sur la planko de la dormoĉambro sin sternas kaj sur la kalkitaj muroj pendas tapiŝoj kun belaj desegnaĵoj. Sur unu lakita tablo staras horloĝo, ter-

moso kaj gramofono. Kaj sur unu kofra stablo estas staplo da silkaj litkovriloj. Sed al demando pri lia vivo antaŭ la Liberiĝo, la mastro respondis ke ĝi estis tiom tragedia. Li diris, ke tiam lia tuta familio posedis nur unu ĉifonan litkovrilon, du kapkusenojn, pecon da ŝirita tapiŝo kaj paron da fajencaj pelvoj; ke li devis laboradi jaron post jaro kiel dungito por terposedantoj.

Antaŭ la Liberiĝo ĉi tiu vilaĝo estis nomata "Amara Vilaĝo". El ĝiaj kvarcent naŭdek familioj estis proksimume kvarcent familioj kies membroj servadis kiel jardungitoj ĉe la bienuloj, kaj estis cent okdek du familioj kiuj posedis nek domon, nek teron. Kaj nun ĉiuj familioj senescepte havas siajn proprajn domojn kaj laktodonajn bovinojn. En la jaro 1962-a, sola en la vilaĝo oni konstruis cent okdek novajn domojn kaj aĉetis ĉirkaŭ tricent diversajn horloĝojn.

### Ĉarma Lago sur Alta Monto


La lago Sajlim sur alta monto estas nigre-verda kaj vastega. Sude de ĝi disetendiĝas granda herbejo, kiu estas plaĉa loko por la kazaĥoj pasigi someron kaj aŭtunon.

Kiam mi alvenis tien, blankaj tendoj staris tie unuj apud aliaj, kaj neĝblankaj ŝafaroj paŝtiĝas sur la herbejo apud la lago kaj de tempo al tempo la paŝtistoj rajdantaj sur purpureruĝaj ĉevaloj ĉirkaŭkuras tien kaj reen, sekvante la ŝafarojn. Sur la stepa strato el blankaj tendoj sin trovas butikoj, poŝtoŝeĵo, banko kaj restoracioj, tie oni povas krome ĝui filmoprezentadon, kaj mi havas la feliĉon vidi tie





*En laborĉambro de la nove konstruita Lan-ŝpinejo de Jili.*  
Foto de Vu Ĉunĝan




*Ĉiu gubernio de la Jili-a Aŭtonoma Subprovinco de Kazaĥoj nun havas sian hospitalon kun bonaj instalaĵoj.*

*Foto de Li Jifang*

rajdkonkurson kiun partoprenis pli ol mil paŝtpopolanoj. La konkursantoj rajdis sur fortaj ĉevaloj, surhavis larĝan zonan ĉe la lumbo, ili kaj kantis kaj ridis; ĉiuj distingindaj konkursantoj ricevis sian premion. Unu respondeculo pri la rajdkonkurso informis min, ke la konkurso estas iniciatita nur post la Liberiĝo kaj okazadas unu fojon ĉiujare. Li plie sciigis al mi, ke post kiam organiziĝis la dudek kvin popolaj komunumoj de bestbreda mastrumado ĉe la baseno de Jili-rivero, sur la fekunda, freŝverda stepo tie kaj tie estas beststaloj, furaĝtenejoj, stacioj por artefarita kaj bonrasa gravedigo, bestokuracejo kaj administrejoj por stepaj aferoj, kaj ĉe montkrutaĵoj kaj valprofundejoj, la registaro ĉiujare asignas grandan sumon por konstruado de paŝtaj vojoj kaj pontoj, kaj tiel garantias la rimarkindan disvolviĝon de la bestbredado.

La vortoj "Jili, la plej fruktodona" antaŭe nur montris admiron al la naturaj kondiĉoj, nun jam havas realan signifon por la popolanoj loĝantaj en la baseno de Jili-rivero.



*DEKSTRE MEZE: La natura paŝtejo ĉe la bordo de Sajlim-lago.*  
Foto de Hju Bang

*DEKSTRE SUBE: Virinoj diversnaciaj iras al la rajdkonkurso.*  
Foto de Hju Bang

# La Agronomiaj Eksperimentoj en Nia Komunumo

## LA KOMENCO

Agronomia eksperimentado estas por ni io nova post la agrikultura kooperativigo. Pro nesufiĉo de homfortoj kaj materialoj, oni ne povis fari eksperimentojn en ia konsiderinda skalo ĝis kiam establiĝis la komunumo.

En la periodo de agrikultura kooperativo, ni volis fari eksperimenton pri du rikoltoj de tritiko kaj kotono en unu jaro, kaj elkulturi bonajn speciojn de maizo per hibridigo. Tamen, la agrikultura kooperativo havis limigitan kapitalon, kaj ne povis aĉeti aparatojn, nek havis kampon por tio. Post la fondiĝo de la komunumo, ĉiuj ĉi tiuj problemoj estis solvitaj. Ni fondis la "tri-en-unu-an" teknikan lernejon de produktado, eksperimentado kaj lernado, kaj la komunumo disponigis ok hektarojn da kampo kiel eksperimentan bazon de la lernejo. Ĉiuj brigadoj sendis al ĝi anojn por studado. Oni eksperimentis nur pri kulturado de maizo dum la periodo de altgrada kooperativo, sed nun la studobjektoj jam inkluzivas tiujn de tritiko, kotono, legumenacoj, legomoj, fruktarboj kaj kultivsistemoj.

En la pasinteco, la eksperimentoj estis farataj sporade, sed nun jam sisteme. Ekzemple, nia eksperimento pri kotonkulturado koncernas 5 speciojn kaj personoj estas asignitaj por speciale zorgi pri la

esplorado kaj registrado dum la tuta periodo de la semado ĝis la rikoltado. Ni jam sukcesis elkulturi per refortiga metodo antirustan specion de tritiko, Bima n-ro 1, kaj per hibridiga metodo sekeg-eltenan, frumaturan, altproduktan specion de maizo de la ĉevaldenta tipo, kiu maturiĝas en nur naŭdek tagoj. Ni sukcesis elkulturi ankaŭ multajn frue maturajn speciojn de tritiko kaj kotono. Per hibridigo de afrika kukurbo kun la ĉina, ni jam akiris novan specion kies frukto povas kreski ĝis 40 kilogramoj kaj la produktokvanto de unu aro atingas pli ol 1000 kilogramojn. Ni ankaŭ faris maŝinojn por fojndispecigo kaj gren-ventumado.

## PRODUKTO ANTAŬENPUŜITA

En la pasinteco, oni ne povis planti kotonon post tritiko en la sama jaro, sed en 1963 ni gajnis kontentigan sukceson en la durikolta eksperimento de tritiko kaj kotono. Kelkaj novaj specioj de grenplantoj de ni kulturitaj donis pli grandan produkton kompare kun la originaj. Ni produktis neniom da fruktoj en la pasinteco, sed nun ni eĉ havas superfluan kvanton da ili por provizi la urbon. Antaŭ 1958, la ŝtato devis liveradi al ni iom da greno en ĉiu jaro, sed nun ĉiujare ni jam povas vendi al la ŝtato kelkmilionajn kilogramojn da greno. Tio ne nur plibonigis la vivon de la komunumanoj, sed ankaŭ ebligis al ili teni mondeponon en banko.

## MULTFLANKA HELPO

Kompreneble, sen ĉiufanka helpo, ni ne povus glate sukcesi. Ekzemple, kiam ni volis studi la teknikon de vastarea pliprodukto, la ŝtato ĝustatempe helpis nin per ĥemiaj sterkoj, kontraŭinsektaj medikamentoj, konstrui du pumpstaciojn, kaj ankaŭ vendis al ni aŭtojn kaj grandajn agrikulturajn instrumentojn. Prof. Ĝaŭ Hongĝang de la Nordokcidenta Kolegio de Agrikulturo ne nur ofte venis al nia komunumo por gvidi nin en eksperimentado, sed ankaŭ instruis nin uzi sciencajn aparatojn. Speciale neforgesebla estas tio, ke mi, iama jardungito en la malnova socio, eĉ eniris universitaton kaj lernis novajn sciojn de agromio.

## PRI MI MEM

Antaŭ ol mi eniris universitaton, ni faris kelkajn eksperimentojn, sed multajn teoriojn ni ne komprenis. Dum kelkaj jaroj ni faris eksperimentojn en specia



*Vang Baŭging (dekstre en blanka vesto) faras sciencan esploron en laboratorio de la komunumo kune kun ĝiaj membroj. Foto de He Ping*



hibridigo, sed ni ne sciis, kial formiĝas nova specio per hibridigo, nek komprenis la internajn ŝanĝojn. En 1960, kune kun kelkaj anoj de nia komunumo, mi iris al la Nordokcidenta Kolegio de Agronomio kaj studis tie unu jaron. Ĝi malfermis por ni specialan kurson kaj kompilis por ni lernolibron. La rektoro eĉ persone helpis nin solvi malfacilajn problemojn. La unujara studo ebligis al ni iri de blinda palpado al klarcela laboro en scienca eksperimentado.

Nuntempe, la temoj de esplorado jam pliiĝis de dekelkaj ĝis pli ol tridek. Antaŭe ni eksperimentis nur en la kampoj, sed hodiaŭ ni faris tion ankaŭ endome. Dum la lastaj jaroj, ni trejniis pli ol tricent



## 300 Specoj da Fruktoj

ZONGHIN

**Ĉ**INIO sin trovas en tri zonoj: malvarmega, mezvarma kaj varmega, kaj ĝi havas favorajn naturkondiĉojn. Pro tio, ĝi estas lando riĉa je fruktarboj. Multaj fruktarbaj specoj kiaj piro, mandarino, persiko, abrikoto, pruno, persimono, zizifo, eribotro, longano kaj liĉio estas originalaj specoj de Ĉinio, kaj multaj varioj de ili jam fariĝis vaste konataj tra la mondo.

En la lastaj kvin jaroj, esplorantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj faris ĝeneralan enketon pri la fruktarboj en la vastega teritorio de Hajnan-insulo en la sudo ĝis Helonggiang-rivero en la nordo kaj de la Orienta Maro ĝis Hingiang kaj Tibeto en la okcidento.

La rezultoj de la enketo indikas, ke el la pli ol 40 familioj de fruktarboj 37 kreskas en Ĉinio. Ili povas esti dividitaj en pli ol 300 specojn kaj sume pli ol 10,000 kulturvariojn.

Antaŭ la Liberiĝo oni neniam faris ĝeneralan enketon pri la riĉaĵo de ĉinaj fruktarboj. Dank' al la farita enketado, multaj novaj specoj estis trovitaj. Ekzemple, en Fugian-provinco kreskas tridek familioj de tropikaj, subtropikaj kaj mezvarmzonaj fruktarboj, kiuj konsistas el 50 genroj, 95 specoj, pli ol 2,000 varioj kaj rasoj; en Hingiang sola estas 78 specoj, kiuj konsistas el pli ol 900 varioj kaj tipoj.

Dum la enketado oni trovis ankaŭ multajn rarajn, altvalorajn variojn kun diferencaj maturtempoj. En Ŝenhi-, Henan- kaj aliaj provincoj estas vintra persiko, kiu maturas en decembro, kiam neĝas; sed en Ŝandong-provinco estas vario de persiko, kiu maturas en la komenco de junio. En Siĉuan-provinco estas "paŭlovniosema oranĝo" kiu maturas en la komenco de oktobro, kaj dolĉa oranĝo kiu maturas nur en la periodo de marto ĝis majo de la sekvant-

teknikistojn por la komunumo kaj nove konstruigis ses laboratoriojn.

Ni tre ĝojas, ke nia scienca eksperimentado en agrikulturo jam donis helpon al ĝia disvolviĝo. Mi persone sentas pli da ĝojo, ke la disvolviĝanta agrikulturo ĉiam elmetas novajn problemojn al nia eksperimentado.

*"La verkinto estas partifilia sekretario de la brigado "Signal-fajro" de tiu komunumo, reprezentanto de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj kaj tutlanda labormodelo.*

jaro. En Guejĝoŭ, Guanghi k. a. provincoj estas speco de pirarbo, kies frukto pezas 1-3 kilogramojn. En Siĉuan-provinco estas pomarbo, kies frukto pezas pli ol duonkilogramon.

La kulturado de fruktarboj post la Liberiĝo multe disvolviĝis, kaj nur en 1958 la tuta kulturareo de ili pligrandiĝis pli ol unuoble en komparo kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Lastjare, oni havis denove riĉan rikolton de fruktoj kies grandparto produktiĝis de arboj plantitaj en 1958.

### Proverboj de Ĉinaj Nacimalplimultoj

#### Ujgura Proverbo

Tigro kaŭras kun intenco  
Ja ne por ekriverenco.

#### Kazaĥaj Proverboj

Amikoj deziras al vi prosperon,  
Sed malamikoj danĝeron.

Ne venkos tiuj, kies brakoj senkomparas,  
Sed venkos tiuj, kiuj bone solidaras.

Antaŭ amikoj fieri ne inklinu,  
Antaŭ malamikoj ne kapklinu.

#### Ĥalhazaj Proverboj

Eĉ sola lupu estas danĝera por dombesto.  
Amiko dum mizero, amiko de sincero;  
Por puran oron trovi, necesas fajre provi.

# Unua de Majo!

# Alveno de Majo

Unua de Majo! Unua de Majo!  
Tag' de luktoj, tag' d' espero.  
Ho! Kiom da homoj falis  
Kaj kiom da larmoj fluis?  
Por akiri homan vivon,  
Feliĉon kaj liberon!  
Sed la lukto ne finiĝis  
Ĉar la la polpo nin brakumas.  
Tial, sentimaj junuloj  
Estu indaj je viaj avoj  
Alten tenu v' ruĝan flagon  
Kiu signos polpomorton.

GAUTIER KARLO, Francio



Alflugis sonoj tra fenestro —  
Ĉu en ĝardeno bardo ludas?  
Ne! Maja vento petolema  
Kanzonon sur ŝalmet' etudas.

Mi vidas amon inter floroj —  
Jam ili dolĉas ĝismedole,  
petalojn kisas sunradioj,  
jen karesante, jen frivole.

Nerezistebla majmiraklo  
eĉ mian ne preteras koron.  
Printempo ravas kaj promesas  
al mi pli helan nun aŭroron.

Kaj tero de verdaĵo plena  
per ametista rob' sin vestas —  
Vespero ardas en purpuro.  
Denove M A J' sin manifestas.

MILDA JAKUBCOVA, ĈSSR

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

## FILMO PRI GANEFO

En marto estis projekciita en Pekino longa kolora dokumenta filmo pri la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj (GANEFO).

La filmo estas kune produktita de Ĉinio kaj Indonezio. Ĝi registris la sukcesojn de GANEFO kaj la amikecon kaj la solidarecon de la popoloj. Partoprenita de pli ol kvindek landoj kaj regionoj ĝi estis granda venko de la popoloj de nove emergantaj fortoj kontraŭ la imperiisma monopolo de la internaciaj sportoj.

## TIBET-LINGVA TELEGRAFO

Ekde januaro ĉijare inter ses grandaj urboj en Tibeto komenciĝis telegrafa servo de tibeta lingvo. La tibetlingvaj telegra-

moj estas transsenditaj per latinaj literoj laŭ fonetika sistemo, kaj la riceva stacio ilin transskribas ree en la tibetan antaŭ sendo al la adresato. La metodo pruviĝas rapida kaj simpla.

## MAN-ALFABETO POR SURD-MUTULOJ

Nova man-alfabeto por surdmutuloj estas publikgita antaŭ nelonge en Ĉinio de la Ministerio de Internaj Aferoj, la Ministerio de Edukado kaj la Komitato por Reformado de Ĉina Skriba Lingvo.

La nova alfabeto estas bazita sur la ĉina fonetika sistemo. Ĝi konsistas el 26 literoj kun kvar kunmetitaj konsonantoj zh, ch, sh kaj ng ofte uzataj en la ĉina lingvo.

Antaŭ la publikigo, ĝia projekto estis jam uzata kvin jarojn ek-

sperimente en lernejoj de surdmutuloj. Nur post revizio laŭ la eksperimentoj ĝi estas fiksita je la nuna sistemo.

## SESOBLE DA NOVAJ URBOJ


Novaj urboj en la Hingiang-a Aŭtonoma Regiono de Ujguroj en la nordokcidento de Ĉinio nombriĝas sesoble de la malnovaj. Antaŭ 14 jaroj en la tuta regiono troviĝis nur dekduo da urboj havantaj po pli ol 2,000 loĝantojn. Sed nun tiaj urboj atingis sepdek.

Multaj el tiuj urboj havas bone disvolviĝintajn industrion kaj necesajn entreprenojn por la popola vivo. La kresko de brutbredado kaj agrikulturo en tiu regiono ofte kreas novajn urbe-tojn kaj iom post iom ili fariĝas centroj de la politiko, ekonomio kaj kulturo.



BIANGI:

## La Plej Varma Loko en Ĉinio



*Vit-valo 5 kilometrojn longa en Turfan-baseno. Ĝi troviĝas inter kalvaj montoj.*  
Foto de Li Ĝongkuj

**E**N Ĉinio, la plej varma loko ne situas en ĝia suda ekstremo proksima al la tropika zono, sed en la malalta Turfan-baseno sur la Nord-okcidenta Altebenejo de Ĉinio. Kvankam tiu loko situas proksime al la norda latitudo 44°, tamen ĝia plej alta temperaturo ĝenerale superas 48°C kaj ifoje eĉ atingas 53°C. Oni diras, ke dum la varmega tempo, ovo povas esti kuirita sur sablejo en dek-kelkaj minutoj. Ĝia varmega periodo estas la plej longa en Ĉinio, kaj pro tio ĝi estas kromnomata “Fajrejo” jam de la antikveco. La temperatura diferenco en la kvar sezonoj estas tre granda. Kelktempe ĝi povas atingi

40°C en unu tago. Inter tieaj popolanoj ofte citata estas jena proverbo: “Matene oni veston vatitan portas, tagmeze en muslinan oni ŝanĝas. Sin varmigante ĉe la forno, akvo-melonon oni manĝas.”


Eble iuj imagus, ke tie estas vasta dezerto sen kreskajo? Fakte ne! Kvankam tie malofte pluvas, la tero estas seka kaj atakas de tempo al tempo “varma vento” fortega, tamen la senprujna periodo daŭras pli ol 200 tagojn. En la batalo kontraŭ naturaj katastrofoj la saĝaj uĝuroj inventis specialajn putojn, kiuj, unu ligiĝas kun alia, subtere alkondukas neĝakvon de Tianŝan-monto por akvumi kampojn. Post la Liberiĝo novaj putoj estis laŭplane fositaj kaj ankaŭ kulturitaj multe da ŝirmaj forstoj, tiel ke la agrikultura produkto rapide disvolviĝis. Nun tiu loko jam fariĝis grava produktejo de fruktoj en Ĉinio. Turfan abunde produktas senseman vinberon, melonon kaj bonkvalitan longfibran kotonon, kies produktkvantoj kreskas jaron post jaro.

Multaj lokoj de la Turfan-baseno fariĝis famaj fruktoproduktejoj. Ĉie sur la kampoj kaj montoj kreskas vinberoj, melonplantoj kaj arboj de abrikoto, persiko, pruno, pomo k. a. Dum la rikolta sezono vinberoj pendas de la subteniloj kiel buntaj perloj. En la pasinta jaro oni denove havis bonan rikolton de fruktoj. La produkta brigado Tujukoŭ sola jam rikoltis 500,000 kg. da vinberoj, t. e. unuoble pli ol tiu de 1962. Kaj la komunumanoj liveris siajn sekvinberojn al ĉiuj lokoj tra la lando.

*Jen kiel bonajn vinberojn oni rikoltis lastjare!*

Foto de Li Ĝongkuj






*Duonsubtera kanalo kreita de la hingiang-a popolo por irigaciado en la dezerto. Foto de Li Jifang*



**DEKSTRE SUPRE:** *Abunda rikolto de Hami-melonoj, fama speco de frukto produktata en Turfan-baseno.*

*Foto de Hju Bang*



**DEKSTRE SUBE:** *Turfan-gubernio estas riĉa produktejo de longfibra koton.*

*Foto de Hju Bang*

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

## **PROGRESO DE JUGUR- NACIO**

La juguroj estas unu el la plej malgrandaj nacioj de Ĉinio. En Gansu-provinco estas aŭtonoma gubernio de tiu popolo. Tie loĝas ĉ. 4000 juguroj krom aliaj nacioj.

La aŭtonoma gubernio faris grandan progreson depost la Liberiĝo.

La brutaro de tiu aŭtonoma gubernio kvinoble kreskis ĝis 309,000 kapoj. Elementaj lernejoj multiĝis de kvar ĝis dudek du kaj fondiĝis tie la unua mezlernejo.

Antaŭe tie troviĝis neniu doktoro, des pli ne hospitalo, sed nun

la gubernio havas hospitalon kun necesaj instalaĵoj.

Landvojoj kaj telegrafaj servoj ekfunkciigis kaj ekĝermis tie ankaŭ industrio.

## **NOVA EVENTO DE LAMAISMO**

Al sep lamaoj en Tibeto el sklava origino oni donis antaŭ nelonge la titolon "Lha-ran-pa Ge-hsi", la plej altan gradon de instruiteco en lamaismo.

Tiu titolo estis donita ĝenerale nur al lamaoj sin dediĉintaj al la studo de lamaismo 30-40 jarojn, kaj havantaj vastan konon de ĝiaj sanktaj libroj. La sklavo-originaj lamaoj neniam antaŭe havis opor-

tunon por tia studo. Tial nur nun estas eble por ili ricevi tian altan distingitecon.

## **LA UNUA ĈINA KOLEGIO DE KARBOMINISTA MEDICINO**

Konforme al la rapida progreso de karbo-industrio kaj la bezono ĉiam pli plibonigi la laborkondiĉojn de la karboministoj, ĉijare fondiĝis en Tangŝan la unua kolegio por trejni kuracistojn ekskluzive por karboministoj. Antaŭ la Liberiĝo en Ĉinio troviĝis nur unu mezlernejo de minista medicino, sed nun jam kvin kaj krome la hospitaloj, sanatorioj kaj refreŝigejoj por la ministoj estas senpagaj.



# Ĉiutagaj Objektoj en Novaj Projektoj



Porcelanaj objektoj faritaj de studentoj kaj instruistoj de la  
Centra Instituto de Industriaj Artoj













# LI DAĜAŬ —

## Iniciatinto de KPĈ

*Ĉijare sian 45an datrevenon pasigos la Majkvara Movado — la patriota demokratia movado de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kaj okazos la 75-a datreveno de la naskiĝo de k-do Li Daĝaŭ, unu el la gvidantoj de la movado, kaj unu el la iniciatintoj de la Komunista Partio de Ĉinio. Por lin memori ni aperigas la jenan artikolon. Pri la Majkvara Movado oni legu la koncernantajn artikolojn en n-ro 3, 1959 kaj n-ro 3, 1961 de nia gazeto. —LA RED.*



**E**STAS k-do Li Daĝaŭ kiu plej frue en Ĉinio trovis la veron de marksismo kaj kondukis la ĉinan revolucion sur la vojon de la Oktobra Revolucio. Li estis la reprezentanto de la komunistaj intelektuloj kiuj gvidis la grandan Majkvaran Movadon kaj unu el la iniciatintoj de la Komunista Partio de Ĉinio.

Li naskiĝis en iu kamparana familio de Laoting-gubernio, Hebej-provinco, en 1889. Tre frue li perdis la gepatrojn kaj plenkreskiĝis sub la zorgado de sia avo. Kiam li estis dekokjara, mortis ankaŭ la avo, kaj li devis forlasi sian hejmlokon. Ĝuste tiam la patrio alfrontis danĝeron de pereco: la registaro de King-dinastio montriĝis ekstreme putra kaj senkapla; la imperiismaj potencoj avide klopodis dispartigi kaj dividi inter si Ĉinion; ĉie en la lando eksplodis revolucio kaj ribelo kontraŭ imperiistoj kaj King-dinastio. En tia situacio li sentis, ke la patrio estas minacata de pereco. Por eltrovi vojon savi la nacion li decidis studi politikon, tial li forveturis al Tiangin ankoraŭ ne fininte la lernadon en liceo.

En Tiangin li estis akceptita de Pejjang-a Jura kaj Politika Instituto. Dum sia lernado, li montris sian talenton por literaturo, kaj fariĝis elstara studento de la instituto. Liaj versaj kaj prozaj verkoj pleniĝis de patriota pasio. Li metis grandan esperon al la revolucio de 1911, sed post kiam la imperiestro estis forpelita, tamen ne aperis vera respubliko, la popolamasoj ankoraŭ restis en la situacio de civila milito kaj natura katastrofo. Ĉio ĉi maltrankviligis la junulon Li Daĝaŭ.

Fininte sian studon en la instituto li fervoris ĉiam pli arde por rekonstruo de Ĉinio. Li sentis ke li ne havas sufiĉe da scioj kaj kapablo, tial kun la helpo de siaj amikoj li veturis al Japanio en 1913 por studi en Ŭaseda Universitato. Diligente li lernis dum tri jaroj en Tokio, kaj tre amis legi verkojn de tiutempaj japanaj marksistoj pri la ekonomiko de Marks kaj la socialismaj pensfluoĵoj de Eŭropo.

Tiam, estis fajra la Unua Mondmilito, li turnis grandan atenton al la ŝanĝiĝo de la politika situacio en la Malproksima Oriento. Kiam la japana ĵurnalo *Osaka Asahi* informis ke Juan Ŝikaj perfidante ĉinan suverenecon subskribis kun japanaj agresantoj la traktaton de dudek unu postuloj, li tuj klopodis alvoki kaj unuigi ĉinajn studentojn tie lernantajn kaj organizi la Asocion de Ĉinaj Studentoj en Japanio, kaj ili telegrafis al la patrolando sian decidon kontraŭbatali ĝismorte la traktaton. Li intense laboris kelkajn tagojn kaj noktojn, kaj finskribis la *Leteron al la Sampatrianoj*, kaj fervore luktis kontraŭ la japana agreso kaj por faligi Juan Ŝikaj. Li publikigis multajn artikolojn, en unu el ili titolita *Juneco*, li kuraĝigis kun vigleco, la popolanojn antaŭenmarŝi sentime, li sopiris sian patrion, ripete prikantis junecojn, alvokis la junulojn rompi memkonscie la reton de la pasinta historio, frakasi ĉiujn arkaikajn doktrinojn, “marŝi antaŭen sed ne returne, for de mal-lumo renkonte al lumo”, kaj fari la kadukan malnovan Ĉinion juna kun novaj fortoj.

En aprilo de 1916, li ĉesigis sian lernadon kaj revenis al Ŝanhajo por partopreni la batalon kontraŭ Juan Ŝikaj. Sub la oponado de la tuta popolo, Juan Ŝikaj mortis de malĝojo kaj malsano. Kvankam Juan Ŝikaj mortis, la reakcia forto de la militaristoj en norda Ĉinio tamen ne mortis, kaj la imperiistoj ankoraŭ invadis Ĉinion. Tial li veturis al Pekino kaj fondis la Ĵurnalon *Matena Sonorilo*. Li sonorigis la alarmon por vekigi la samlandanojn el iluzioj kaj ilin instigi al kreo de “juneca Ĉinio”. Sed li laboris nur tri monatojn kaj devis ekŝiĝi kiel ĝia ĉefredaktoro pro tio ke la ĵurnalo falis en la manojn de reakciaj politikistoj. Post nelonge li eklaboris ĉe alia ĵurnalo kiel redaktoro. Tiam estis ĝuste la antaŭvespero de la venko de la socialisma revolucio en Sovetunio. K-do Li Daĝaŭ atenteme observadis la disvolviĝon de la rusa revolucio. Post la venko de la Oktobra Revolu-

cio, li verkis artikolon por arde hurai la naskiĝon de la unua socialisma lando en la mondo.

En februaro de 1918, k-do Li estis invitita de la Pekina Universitato kiel bibliotekestro kaj profesoro de ekonomiko. De tiam la konata "Ruĝa Domego" de la Pekina Universitato fariĝis lulilo de revolucio. En tiu ĉi periodo li pli profunde studadis marksismon kaj la sperton de revolucio en Sovetunio. Tute senhezite li prenis la vojon de la Oktobra Revolucio. En la gazeto *Nova Junulo*, la iniciatinto de nova kultura movado, li publikigis sinsekve la artikolojn *La Venko de la Popolo* kaj *La Venko de la Bolŝevistoj*, per kiuj li ĝuste taksis la karakteron kaj rezulton de la Unua Mondmilito kaj la sukceson de la sovetia revolucio. Kun plena konvinkiĝo li antaŭdiris: "Rigardu al la mondo venonta, ĝi nepre estos la mondo de ruĝaj standardoj." Arde dezirante savi la nacion el krizo kaj krei "liberan hejmlandon" li finfine trovis la veron de marksismo. Kelkajn tagojn antaŭ la eksplodo de la Majkvara Movado, li publikigis sian artikolon *Mia Vidpunkto pri Marksismo* en la speciala numero de la gazeto *Nova Junulo* dediĉita al marksismo, per kiu la unuan fojon li sisteme konigis la teorion de marksismo al ĉinaj legantoj.

Krom verkado de artikoloj, k-do Li donis kursojn pri historia materiismo, sociologio, ktp., en la Pekina Universitato kaj aliaj lernejoj, kaj fariĝis unu el la eminentaj profesoroj en tiu tempo. Li faris propagandon pri marksismo en klasĉambroj kaj periodaĵoj, konigis la sperton de sovetia revolucio, progresigis la novan kulturen movadon, kaj samtempe li aktive gvidis kaj partoprenis la patriotan nacisavan movadon de junaj studentoj. En la vintro de 1918, sub lia gvidado, parto de la progresemaĵoj organizis studkunvenon pri marksismo en la Pekina Universitato.

En 1919, eksplodis la flama patriota Majkvara Movado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Tiu ĉi movado malfermis novan paĝon de la ĉina historio — la novdemokratia revolucio. K-do Li estis unu el la organizantoj kaj gvidantoj de la movado. La Majkvara Movado akcelis la kunligon de marksismo kaj laborista movado, kaj faris preparan laboron por la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio. Depost tiam la fizionomio de la ĉina revolucio ŝanĝiĝis radikale.

La revolucia operacio de la Majkvara Movado celis ĝuste likvidi feŭdismon kiu regis la ĉinan popolon dum kelkmil jaroj kaj forigi la imperiismajn agresantojn. Post la Majkvara Movado, en la tendaro de novkultura revolucio okazis publika disiĝo de la ideologio kaj linio de la proletaro kaj tiuj de la burĝaro. K-do Li batalis persiste kontraŭ la reakcia linio de burĝa reformismo kun Hu Ŝi kiel ĝia reprezentanto.

Post la Majkvara Movado, li daŭre gvidis la amasmovadon de laboristoj kaj studentoj alvokante

ke junuloj-intelektuloj iru labori en la kamparon kaj aliflanke li aktive preparis por fondi kompartion. En 1921, fondiĝis la Komunista Partio de Ĉinio kun li kiel unu el ĝiaj iniciatintoj, li prenis sur sin la respondecon de la partiaj laboroj en norda Ĉinio, kaj sub lia gvido, multe disvolviĝis la laboristo-kamparana kaj socia movadoj en nordaj provincoj. En la jaro 1924, li helpis D-ron Sun Jatsen reorganizi Kuomintangon kaj difinis la Tri Grandajn Politikojn: "ligiĝi kun Rusio, ligiĝi kun kompartio kaj subteni la laboristaron kaj kamparanaron". Li ludis gravan rolon en efektivaigo de kunlaboro inter Kuomintango kaj Kompartio. En aprilo de la sama jaro, gvidante la delegacion de la Komunista Partio de Ĉinio, li ĉeestis la Kvinan Kongreson de la Komunista Internacio okazintan en Moskvo. Li vidis propraokule la atingojn de socialisma konstruado en Sovetunio, kaj tio plifirmigis lian fidon pri la venko de la ĉina revolucio.

Post la sangverŝo de "la Dekoka de Márto", li sin turnis al subtera aktivado, kaj per sia tuta tempo, li gvidis la revolucionan movadon de popolamasoj en norda Ĉinio kaj subtenis la Norden-Ekspedician Armeon. La militarista registaro ĉiam prenis lin kiel dornon en la okulo, kaj intrigis lin murdi per hontinda rimedo. Iuj kamaradoj kaj amikoj admonis lin forlasi Pekinon portempe, sed li danke rifuzis, kaj lasis aliajn kamaradojn rifuĝi alivestite en diversajn lokojn. Li kaj kelkaj kamaradoj restis en Pekino por persiste daŭrigi la laboron.

En la mateno de la 6-a de aprilo, 1927, la reakciuloj, mobilizinte kelkcent policianojn kaj spionojn en la kunlaboro de japanaj kaj usonaj imperiistoj, arestis k-dojn Li Daĝaŭ kaj aliajn. Arestite, li eltenis ĉiajn kruelajn torturojn de la malamiko sed li restis ĉiam firmvola kaj malcedema. La enkarcerigo de k-do Li vekis vastan simpatian ĉe la publika opinio. Multaj homoj el diversaj rondoj klopodis lin savi, precipe la fervojistoj de norda Ĉinio eĉ organizis atakgrupon por elkarcerigi lin perforte. Tamen li, informiĝinte pri tio ĉi, insiste malakceptis tian helpon por konservi la revolucionan forton. En la 28-a de aprilo, la militarista registaro starigis specialan tribunalon por sekreta juĝado kaj haste kondamnis lin kaj aliajn dek naŭ kamaradojn al pendigo. Kiam okazis la ekzekuto, k-do Li Daĝaŭ la unua iris sur la eŝafodon vestite kiel kutime en sia griza vatita robo, kun sinteno tre trankvila kaj aplomba. Li indigne faris sian lastan parolon deklarante ke "Komunismo nepre venkos en Ĉinio!" kaj trifoje kriis "Vivu Kompartio!"

Kiam k-do Li martiriĝis, li estis nur 39-jara. Por savi la ĉinan popolon el mizero, por realigi en la patrio la grandan idealon de komunismo, li bataladis dum sia mallonga vivo fidele kaj sencede kun sindonemo kaj preparis la naskiĝon de "juneca Ĉinio" per sia tuta energio.



## Ĝojo de Maljuna Tradukisto

**E**N la Halo de Literaturistoj kaj Artistoj en Ŝanhajo, oni ofte vidas ke la maljuna tradukisto Li Kingja interparolas vigle kun tradukistoj, verkistoj, redaktistoj kaj ĵurnalistoj. Lasttempe mi refoje lin renkontis tie.

Mi aŭdis, ke li ĵus ĉinigis la francan romanon *Tri Musketistoj* de Alexandre Dumas Père. Tial je la renkontiĝo mi tuj lin demandis pri la tempo de ĝia eldoniĝo.

“Baldaŭ,” li respondis, “eble post du aŭ tri monatoj.”

Tiu ĉi estas la sesa libro de li tradukita post la Liberiĝo. La aliaj libroj, tradukitaj de li en la pasintaj 14 jaroj, estas: *La Ventro de Parizo* de Emile Zola, *Oriol-monto*, *Bel-amiko*, *Unu Vivo* kaj *La Elektitaj Noveloj* de Guy de Maupassant.

Jam en la jaro 1920-a li komencis konatigi francan literaturon al la ĉina popolo. Ekde tiam, en la daŭro de pli ol 40 jaroj, li tradukis pli ol 30 librojn de noveloj kaj romanoj. Ili ĉiuj estis verkoj de majstroj depost la jaro 1860. La plejparto el ili apartenas al la skolo realisma.

Pro kio li ŝatas precipe la verkojn realismajn?

“Ĉar,” li diris, “mi pli bone konas la epokon priskribitan en tiuj verkoj. En 1907 mi studis en Parizo, kaj tiam la franca socio preskaŭ similis al tiu en la lasta duono de la 19-a jarcento. El miaj propraj travivaĵoj mi sentis intimecon kaj facilan kompreneblecon de tiuj realismaj verkoj kiuj spegulas la socian vivon de Francio en la periodo post 1850. Tio estas por mi favora kondiĉo kiu garantias la kvaliton de

mia traduko kaj alportas al mi plezuron en la laboro. Sed antaŭ la Liberiĝo mi ne havis klare difinitan celon por la tradukado, iafoje mi tradukis nur pro interesiĝo kaj iafoje eĉ por kontentigi vivbezonojn.”

Tiam li ekmemoris kun emociiĝo pri siaj mizeroj antaŭ la Liberiĝo. Tiam li laboris kiel instruisto en pluraj altlernejoj, sed li neniam ĝuis la sekurecon pri sia posteno kaj lia salajro ofte ne sufiĉis por vivtenilian familion. Sub tia kondiĉo li estis devigata sin okupi pri tradukado por iom multigi sian enspezon.

“Nur en la lastaj pli ol dek jaroj post la Liberiĝo,” li rekomencis, “iom post iom mi komprenis la signifon en konatigo de eksterlanda literaturo al la ĉina popolo, nome por la heredo de la monda kulturo. Tial, kiam mi elektas verkon por traduki mi devas pripensi ne nur tion ĉu ĝi estas la ĉefverko de la aŭtoro, sed ankaŭ ĉu nia popolo ĝin bezonas.

“Kaj nun la afero estas vere malsama ol antaŭe,” li daŭrigis kun ekscitiĝo, “tradukistoj kaj eldonejoj fariĝis kvazaŭ intimaj amikoj, kaj inter ili ne plu regas negocaj rilatoj. La redaktistoj ofte zorgeme kaj detale faras al mi valorajn konsilojn por plibonigi mian tradukaĵon. Severaj estas iliaj postuloj, sed mi havas la senton de intimeco kaj feliĉo, ĉar ni ĉiuj devas plenumi nian devon al la legantoj. Krome, mi multe progresis profitante el la fojo-post-foja korektado.”

El lia parolo mi informiĝis pri multe da detaloj de lia laboro. Dum tradukado li ĉiam atenteme studas ĉiun vorton kaj ĉiun frazon. Kiam li renkontas en la originalo terminojn pri konstruaĵoj, veturiloj, meblaroj, kostumoj, manĝaĵoj, birdoj, bestoj, floroj, arboj kaj aliaj, li



S-ro Li Kingja manĝas akvomelonon kun siaj familianoj.

ofte konsultas multajn fremdlingvajjn fakvortarojn kaj ĉinajn antikvajn librojn, kelkfoje li eĉ mem iris al specialistoj diversfakaj kaj petis de ili konsilojn por korekte kaj precize traduki iujn terminojn.

Nun li estas 78-jara. Ekde 1958 li funkcias kiel vicestro de la Institucio por Veteranoj de Kulturaj kaj Sociaj Laboroj. Malgraŭ sia okupateco li ankoraŭ multe tradukis en la postlaboraj horoj kaj ĝis nun li tradukis proksimume du milionojn da ĉinaj ideografiaĵoj. Dum libertempo, li ŝatas fari kegloludon en la Kultura Klubo.

Kiam li parolis pri sia Institucio, li diris kun ĝojo ke ĝi fondiĝis en la jaro 1953 kaj nun havas ĉirkaŭ 400 laborantojn kies meznombra aĝo estas 73 jaroj, kaj kelkaj dekoj el ili jam atingis aĝon de pli ol 80 jaroj. Ili okupiĝas aŭ pri verkado de libroj, aŭ pri pentrado kaj versado. Ĉiu el ili ekspluatas sian kapablon, kaj "kune floras cent floroj". Ili sentas, ke vere feliĉa estas la maljuneco kiun ili ĝuas en tiu ĉi nova socio, kiel diras la ĉina proverbo, "Manĝate ekde 1' supra parto, ĉiam pli dolĉas sukero." El la ekscitita mieno de nia veterana tradukisto mi konvinkiĝis, ke ankaŭ en lia koro regas tiu sama sento.

## Mirindaĵoj Koncerne al Mono

ZONGHIN



**M**ONO, laŭdire, havas dian potencon. En la tiel nomata "alt-civiliza" socio ekzistas eĉ monadorismo formiĝinta ĉirkaŭ mono kaj eĉ la arto de monadoro. Ĉio ĉi jam delonge fariĝis nemirindaj mirindaĵoj.

Sed ne malmultaj estas niaj amikoj el fremdaj landoj, kiuj trovis novajn mirindaĵojn pri mono en la liberigita Ĉinio.

### "ĈU ĜI ESTAS LA MIA?"

En la mezo de novembro, 1963, du el niaj eksterlandaj amikoj, elirinte el iu flor-birda vendejo ĉe Nankin-strato de Ŝanhajo, promenis akompanate de sia interpretisto. Subite unu knabo dekunu- aŭ dekdu-jara, en helflava jaketo, kuratingis ilin kun 10-juana monbileto en sia mano. Li kaptis la interpretiston je la mano, dirante: "Bonvolu demandi ĉi tiun fremdan gaston, ĉu li perdis monon." Tion aŭdinte, la fremda gasto suprenŝovis la ŝultrojn, por montri, ke li perdis nenion. La interpretisto diris: "Traser-ĉu viajn poŝojn." La fremda gasto do elpoŝigis sian monon kaj post kalkulo trovis maleston de 10 juanoj. Li diris kun miro: "Ĉu ĝi estas la mia?" Kun kapjesoj la knabo diris: "Mi vidis, ke vi faris aĉeton en la flor-birda vendejo. Post kiam vi foriris, mi trovis la monbileton sur la planko kaj mi pensis, ke eble vi ĝin perdis."

La fremda gasto tiel ekscitiĝis, ke li ne sciis kion diri. Li elprenis fontoplumon el sia poŝo kaj intencis

donaci ĝin al la knabo, sed manskuante la knabo tuj forrapidis kaj malaperis en homamaso.

### "ĈI TIE TRINKMONO ESTAS MALAKCEPTATA"


Iu gasto el Afriko loĝis kelkajn tagojn en hotelo de Ŝanhajo. La laborantoj de la hotelo estis tre servemaj kaj multe kontentigis lin. Ĉe la adiaŭo li donis koverton al iu kelnero de la manĝejo. La kelnero malfermis la koverton kaj trovis en ĝi vizit-karton kaj 20 juanojn. Li tuj redonis la monon al la fremda gasto kaj klarigis al li, ke "ĉi tie trinkmono estas malakceptata" kaj servado al la klientoj estas lia propra devo. La gasto multe kortuŝiĝis. Li devis repreni la monon kaj restigi al li nur la vizit-karton kiel memorajon.

### "LA ĈINOJ ESTAS HONESTAJ"

Iun vesperon unu eksterlanda gasto volis iom rigardi pri stratoj de Ŝanhajo. Li veturis per triciklo. Pro baro de lingvo li erare atingis lokon necelitan, kaj li sukcesis atingi la ĝustan lokon nur post longa ĉirkaŭveturado.

Por pagi la veturon la fremda gasto elpoŝigis 5-juanan monbileton. Sed la triciklisto skuis sian manon por montri, ke la pago estas tro multa. La gasto do elpoŝigis por li 2-juanan monbileton, sed la triciklisto denove skuis la manon. Fine li elpoŝigis 1-juanan monbileton. Ĝin akceptinte la triciklisto tamen redonis al li dekojn da cendoj. La fremda gasto ne volis preni ilin, sed la triciklisto klarigis, ke li devas pagigi laŭ la oficiale fiksita tarifo. La fremda gasto emociiĝis dirante: "La ĉinoj estas honestaj!"





# La Blanka Velŝipeto

**B**ALDAŬ venos la Novjara Festo. La interno de la Ŝanhaja Marista Klubo estis bele kaj riĉe dekoraciita. Kio plej altiris ĉies atenton estis la ekspozicio de donacoj de maristoj. Tie estis elmontrataj diversaj objektoj donacitaj de niaj eksterlandaj amikoj — maristoj el diversaj havenoj de la mondo.

En la jarfina vespero mi iris viziti la ekspozicion de la klubo kune kun miaj kamaradoj. Kiam mi alproksimiĝis al iu blanka velŝipeto, ia nepriskribebla sento firme kaptis mian koron. Mi kliniĝis por rigardi pli detale kaj efektive trovis sur la ŝiprando, kiu estas tiel blanke lakita ke nenia makulo estas trovebla sur ĝi, linion da oraj literoj: AVIDU, la nomo de ĝia kreinto kaj donacinto.

La blanka velŝipeto! La blanka velŝipeto de Avidu!

Mi staris antaŭ ĝi, kun koro bolanta kvazaŭ maro en ŝtormo. Kiel mi deziris laŭte rakonti ĝian historion al ĉiu, kiu alproksimiĝis por ĝin rigardi! . . .

Ne pli frue ol en la pasinta somero veturis en la havenon Ŝanhajo oceana vaporsipego tre luksaspekta. Kvankam ĝi estas varŝipo, en ĝi sin trovas ankaŭ kelkaj pasaĝeraj kajutoj. La senmankeco de ilia ekipo kaj la imponeco de ilia dekoracio estas apenaŭ troveblaj ĉe ordinaraĵoj pasaĝersipoj. De la nomlisto de la preterpasantaj pasaĝeroj mi informiĝis, ke la pli ol dek pasaĝeroj nun loĝantaj en tiuj kajutoj estas: bankiero en ferioj, municiaisto kiu ripozigas siajn nervojn per vojaĝo, ekŝiĝinta generalo, sinjorino kiun ravas la sunleviĝo sur la maro. . . . unuvorte, ili ne similis al ordinaraĵoj pasaĝeroj, kiuj deziras rapidi de unu loko al alia.

Kiam mi surŝipiĝis laŭ ordono por plenumi mian devon de deĵoranto, la plejparto de la pasaĝeroj kaj maristoj jam surbordiĝis. Paŝante sur la vasta ferdeko, mi venis de la luksaj antaŭaj kajutoj al la malantaŭaj, kie loĝas la ordinaraĵoj maristoj. Malgraŭ tio, ke jam forpasis la somermezo, la furiozeco de la flamanta suno ankoraŭ neniom malpliĝis. Kiam mi kliniĝinte eniris en trairejon ĉe la malantaŭaj kajutoj, eliĝis tie maso post maso da varma aero, kiuj preskaŭ min sufokis.

Kaj en unu el tiuj malgrandaj, malaltaj kaj preme varmegaj dormoĉambroj de la maristoj mi vidis negran mariston, kiu sidante en sia lito estis fiksanta malgrandan velon el blanka silko al lakita ŝipmodelo.

La lito estas duetaĝa. Malgraŭ ke li tre malalten sin klinis tamen li apenaŭ povis sidi sur la litrando. Tial mi ne povis klare vidi lian vizaĝon. Tio kion mi vidis estis nur la ŝvitgutoj eliĝantaj sur lia frunto kaj lia delonge malsekiĝinta mallong-manika ĉemizo, kiu nedisigeble algluiĝis al lia korpo.

Mi eniris, kio lin ĝenis. Li rapide stariĝis kaj min salutis. “Kial vi ne surbordiĝis por promeno, kiam vi ne deĵoras?” mi demandis.

Demetinte la velŝipeton, li amare ridis al mi kaj ĵetante la grandajn manojn ambaŭflanken respondis: “Mi ne havas permesilon por surteriĝo!”

Ĉu estas io erara pri la pasporto? Mi petis lin montri al mi sian pasporton. Ĝi estis tute laŭleĝa kaj li rajtis peti surteriĝon. Kial do li tion ne faris? Mi ne povis ne miri kaj denove demandis al li: “Avidu, ŝajnas al mi, ke vi ne volas surbordiĝi por promeno, ĉu?”

Li rapide skuis la kapon kaj diris: “Kiom mi deziras surbordiĝi! Mi venas al Ĉinio la unuan fojon. Kiel ege mi ŝatus rigardi la landon!” Post tio li kru-cigis la brakojn antaŭ la vasta brusto kaj diris rapide kun emocio: “En iu ĉina bildgazeto mi vidis ĝiajn belajn bonordajn stratojn, domojn kun ĝardenoj speciale konstruitajn por la laboristoj kaj la ridantaj vizaĝojn de ĝia popolo. Ha! Mi vizitis Ĉinion en sonĝoj. Kiel mi deziras, ke tiuj sonĝoj fariĝu reala vivo!”

Avidu, kiel la aliaj negraj maristoj kun kiuj mi havis kontakton, trovinte ke vi alparolas lin sen mokemo aŭ malicaj celoj, tuj vaste malfermas al vi sian koron senrezerve. Rigardante al li, mi ekmemoris du versojn de iu poeto:

*Ilia haŭto estas nokt-mallumo;  
Ilia koro estas brila suno.*

“Avidu, kio vin ĉagrenas?” mi diris al li sincere. “Avidu, diru al mi, kial vi ne petis por surteriĝo.”

Ĵetinte al mi fiksan rigardon, li klinis la kapon:

“Mi faris eraron,” la tono de Avidu forte neis la enhavon de tio kion li diris. Mi ekscitiĝis kaj plue demandis:

“Kia ‘eraro’?”

Avidu levis la kapon kaj etendis siajn brakojn alten en la aeron. Mi rimarkis, ke liaj okuloj komencis malsekiĝi. Li diris indigne:

“Ĉar mi estas negro!”

Nereteneble mi etendis al li mian manon, kiun li firme ekpremis. “Avidu,” mi diris, “kredu, ke ĉiu ĉino estas via amiko. Diru al mi, kiamaniere mi povas vin helpi!”

Avidu komencis rakonti pri sia “eraro”:

La ŝipo alproksimiĝis al la kajo. Avidu estis inter tiuj kiuj povus surbordiĝi la unuaj. Ekscititeco forgeŝigis lin pri ĉio. Kiam li revenis lipfajfante finlavinte la ferdekon de la antaŭaj kajutoj, li piedpremis “Etan Julian” pro malzorgo.

Eta Julia estis tiel nomata purrasa blanka buldogo. Ĝi kuŝis kuntiriĝinte sur la ferdeko. Ja tiel malgranda ĝi estis ke ĝi estis apenaŭ rimarkebla por hasta iranto. Ĝenerale senintenca piedpremo al hundo estas ja nenio grava. Sed nun la okazaĵo envolvis du personojn kaj tial vekis la atenton de la tuta ŝipo.

Unu el la du personoj estis la mastrino kaj patronino de Eta Julia, “s-ino Ŝtono”. La sinjorino havas eminentan devenon kaj altan rangon socian. Eĉ la kapitano kun senlima aŭtoritateco devas kapkliniĝi antaŭ ŝi.

Aŭdinte la plendajn kriojn de Eta Julia, la sinjorino kaj kordoloris kaj koleris. Krome, la kulpinto estis negro! Por mildigi la koleron de la sinjorino, la kapitano decidis puni Avidu per malpermeso al la surteriĝo.

. . . . .

Finrakontinte, Avidu fikse rigardis al mi kun sopiro kaj mallaŭte diris: “Kiel mi deziras vidi Ĉinion! Diru al mi, ĉu mi rajtas peti surteriĝon!”

“Laŭ la regularo de nia registaro, ŝipanoj povas prezenti peton por surteriĝo per sia pasporto aŭ marista certigilo, Avidu!”

Avidu salte stariĝis de sur la litrando kaj diris ekscitite:

“Mi prezentos peton, mi formale prezentos peton.”

Post kontrolo kaj sankcio de la Landlima Kontrola Stacio, permesilo por surteriĝo estis donita al Avidu. Finfine li surbordiĝis. La paro de liaj fortikaj piedoj surpaŝis la kajon de Ŝanhajo — la unuan fojon dum sia vivo li surpaŝis la teron de Ĉinio. Tie li staris, kaj returniĝinte mansalutis al mi. Mi kliniĝis sur la ferdeko de la ŝipego kaj laŭte kriis:

“Ĝis la vespero, Avidu!”

La somera nokto, kun siaj ekblovoj de malvarmeta mara vento, alvenis al nia haveno Ŝanhajo. La sennombraĵ steloj trembriladis en la nokta ĉielo super mia kapo kaj en la rivero sub miaj piedoj. Mi ne povis ne rememori la du brilajn sincerajn okulojn de Avidu. . . .

Kiam Avidu revenis al la ŝipo, jam profundiĝis la nokto. Li plene vigliĝis. Lia vizaĝo disradiis koran ridon, ke liaj dikaj lipoj ne povis kunpremiĝi. Trovinte min, li tiris min al iu kvieta angulo de la ferdeko kaj entuziasme rakontis al mi kun mangestoj, kion li vidis kaj aŭdis.

“Kondukate de iu helpema gvidisto de la Ĉina Internacia Vojaĝoservo, mi faris viziton al nova vilaĝo por laboristoj!” Li detale rakontis al mi, kiel li estis invitita gastigi ĉe iu maljuna emeritiĝinta laboristo: “La mastro montris al mi foton, kiun iu ĵurnalisto faris por ili kiam la tuta familio de la mastro diris adiaŭon al sia kaduka kabanaĉo. Mi neniam forgesos, ke mi vidis tiun foton en la nova domo, kie la mastro nun loĝas.”

Avidu parolis ankaŭ pri niaj popolaj policanoj. “Mi propraokule vidis,” li diris, “iun policanon zorgeme helpanta maljunulinon en simpla vesto transiri straton, kiun trapasis aŭtomobiloj seninterrompe. En la komenco mi pensis, ke la maljunulino estas la patrino de la policano, sed poste kiam mi vidis lin helpi alian maljunulinon, mi sciis ke mi eraris.” Avidu ekĝemetis kaj diris: “En la loko kie mi loĝas, la policanoj traktas homojn en neluksaj vestoj, kiom ajn da jaroj ili havas, per la bastonoj en siaj manoj.”

Fininte sian rakonton pri nia policano, Avidu rakontis ankaŭ, kiel li veturis en aŭtobuso: “Post kiam mi enaŭtobusiĝis, mi zorgeme demandis al la konduktorino: ‘Diru al mi, kiujn sidlokojn ni negroj povas okupi.’ Ŝi estis juna knabino kaj verŝajne ne komprenis miajn vortojn. Antaŭ ol mia gvidisto povis ekparoli, iu grizhara maljunulo kun orframaj okulvitroj — verŝajne kuracisto — jam stariĝis kaj amike diris al mi flue en la angla lingvo: ‘Amiko, se plaĉas al vi, kiun ajn sidlokon vi povas okupi. Ĉi tie estas Ĉinio!’” Nun li malaltigis sian voĉon kaj diris kvazaŭ el sia tuta koro: “Ĉinio, Avidu —” Li firme kunpremis siajn du grandajn manojn: “Amikoj!”

. . . Unu tagon poste la ŝipego estis deankriĝonta kaj forlasonta Ŝanhajon. Trovinte iom da libertempo, Avidu kunportis sian finkonstruitan blankan velŝipeton kaj tiris min al iu loko malfrekventata. Li metis la velŝipeton en miajn manojn, dirante: “Mi postlasas ĝin al vi!”

Tiam mi nur pensis, ke Avidu donas al mi sian memfaritan donacon kiel memoraĵon. Sed kiam mi finaŭskultis lian malĝojigan rakonton, mi efektive komprenis lian koron kaj kian signifon la blanka velŝipeto havas por li.

“Amiko,” Avidu diris al mi, “kvankam mi naskiĝis en la kontinento Eŭropo, tamen mia vera hejmloko estas en Afriko, sur malgranda insulo proksima al la sudafrika marbordo. Mi neniam vidis ĝin, sed el la buŝo de mia avino mi scias, ke tie estas arbaroj kun arboj 100-200 futojn altaj, kvazaŭ la ĉielo estus subtenata de ili. Tie la folioj estas verdaj eĉ en vintro



kaj la tero kreskigas grenojn en unu monato post semado. Krome, nia ŝatata danco kaj la granda uragana koncerto. . . . Ho, mia hejmloko! Kiel mi sopiras ĝin tage kaj nokte! Sed mi ne povas iri tien. Mia avo estis sklavo. Tiutempe li estis ligita kiel porko kaj transportita de tie al Eŭropo. Hodiaŭ, kvankam mi ne estas brulstampita per marko de sklavo, mi tamen ankoraŭ ne povas reveni al mia hejmloko!" Tion dirinte, li longe ekĝemis indigne. Post tio li etendis la manon por palpi la blankan velŝipeton en miaj manoj kaj honteme ekridis:

"Dum mia infaneco mi ofte revis, ke plenkreskiĝinte mi mem faros velŝipon kaj veturos al la hejmlando. Nun mi estas jam delonge plenkreska, sed mi estas kapabla nur fari velŝipon kun tia grandeco!" Tiam el liaj okuloj similaj al nigraj gemoj disjetigis forta brilo. Palpante la blankan velŝipeton, li daŭrigis:

"Ĝi estas mia espero, mia estonteco. Iam mi nepre revenos al mia hejmloko!"

. . . . .

Nia amiko, nia Avidu forlasis Ĉinion, sed li postlasis sian amatan blankan velŝipeton en Ĉinio. Li postlasis sian esperon kaj sian koron en Ĉinio!

Trad. PANDIŜO

## La Metalsona Arbo

Apud la tombo de Jue Fej\* ĉe la Okcidenta Lago de Hangĝou staras nigratrunka, tre kompakta cipreso, kiu sonas metale, kiam ĝi ricevas batojn. Popola legendo rakontas, ke la lojaleco de Jue Fej tiel kortuŝis la arbon ke tiu ĉi fariĝis tiom kompakta. Tial oni nomas ĝin "lojala cipreso". Sed, fakte, tiaj cipresoj troviĝas ankaŭ en Hebej, Ŝanhi kaj aliaj provincoj. Ĝia trunko fariĝas kompakta pro la ensorbita siliko el la grundo. En mineralogio tia arbo estas nomata "silikiĝinta arbo".

\* *Patrioto-generalo de Song-dinastio*  
(960-1279 p. K.).

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

### ARTA EKSPOZICIO PRI KOMUNUMOJ

En marto okazis en Pekino Ekspozicio de Pentraĵoj pri la Kamparaj Popol-komunumoj. Ekspoziciitaj estis 291 artaj verkoj. Ili estas la fruktoj de pentristoj, kiuj vizitis la kamparojn en 1963. Triono el la pentraĵoj apartenas al la kategorio de ĉina tradicia stilo, kaj la ceteraj estas olepentraĵoj, lignogravuraĵoj, akvareloj kaj skizoj. La temoj estas prenita el la kamparoj tra la tuta lando norde de la "Norda Sovagejo" ĝis la suda Hajnan-insulo. Ĉiuj pentraĵoj respegulas la revolucionan entuziasmon, la noblajn kvalitojn de la popoloj en la kamparo, kaj vive bildigis la prosperon de la popolaj komunumoj.

### INSTRUISTOJ DE NACI- MALPLIMULTOJ

La instruistoj de naciaj malplimultoj en Ĉinio rapide kreskas.

Sole en la du regionoj de Interna Mongolio kaj Tibeto ilia nombro atingis 12,000. El ili multaj ludas gravan rolon en la lernejoj kiel lernejestroj, lektoroj aŭ vicprofesoroj en la altaj lernejoj.

Ankaŭ en Junnan-provinco la nombro de instruistoj de naciaj malplimultoj en la elementaj kaj mezaj lernejoj multe kreskis ĝis pli ol 9000. El la 21 naciaj malplimultoj en tiu provinco havas ĉiu siajn proprajn instruistojn.

Plejparto el tiuj instruistoj devenis de antaŭaj sklavoj, paŝtistoj kaj kamparanaj familioj. Nur post la Liberiĝo, ili povis lerni en la lernejoj.

### ESPLORADO PRI LA GLACIIGITA TERTAVOLO

Speciala ekspedicio de sciencistoj estis sendita al Tibeto por esplori tie la glaciigitan tertavolon. Estas konstatite, ke en Tibeto troviĝas la plej granda regiono de

glaciigita tertavolo en Ĉinio. Ĝi troviĝis unu ĝis 3 metrojn sub la surfaco de la tero, kaj ĝia dikeco varias de 100 ĝis 150 metroj.

La sciencistoj faris detalan esploradon pri la materiaj konsistoj, strukturoj, kaj temperaturoj de la tertavolo kaj pri ĝiaj influoj al la kreskaĵoj.

### NOVE TROVITA FOSILIO DE SIMI-HOMO

Ĉinaj sciencistoj trovis en 1963 novan sendifektan fosilion de mal-supra makzelo de simi-homo en Lantian-gubernio, Ŝanhi-provinco. Ĝi estas trovita en la ruĝa tertavolo de la Kvaternara Periodo. Kaj proksime de ĝi oni trovis ankaŭ multajn fosiliojn de aliaj bestoj en prahistoria tempo. Laŭ ekspertizo de sciencistoj ĝi apartenis al iu maljuna simi-homo antaŭ ĉirkaŭ 400,000-500,000 jaroj, t. e. la sama periodo en kiu fariĝis tiu trovita en Ĝoukouĉian.



# Tra la Persikfloroj

TAŬ JUANMING

**D**UM la regperiodo Tajjuan de Gin-dinastio vivis iu fiŝisto en Vuling. Foje li remis boaton laŭ rivereto, tute nekonsciante, kiom malproksimen li iris. Li atingis neatendite persikarbaron, kiu etendiĝis kelkcent paŝojn de la bordoj. Neniu alispeca arbo makulis la arbaron. Freŝe belaj floroj aromis kaj defalintaj petaloj kolorigis la teron. La sceno vekis kuriozan senton al la fiŝisto. Li do plu iris por trovi la finon de la arbaro.

Ĉe la arbarfino li trovis fonton, de kie elfluis la rivereto. Tie staris monto kun malgranda groto, tra kiu verŝajne eliĝis lumo. La fiŝisto forlasis la boaton kaj eniris la groton. La enirejo estis tiel mallarĝa, ke ĝi apenaŭ permesis eniri unuopan personon. Tamen

post dekoj da paŝoj li sin trovis en plena helo sur vasta terebena. Domoj staris en ordo, kuŝis riĉaj kampoj ĉirkaŭ bela lago kaj vojoj interplektiĝis. La lokon ornamis miloj da morusarboj kaj bambuoj. Tie kaj tie aŭdiĝis kokokrioj kaj hundobojoj.

Homoj iris, laboris kaj estis vestitaj same kiel eksteraj loĝantoj. Maljunaj geviroj kaj infanoj aspektis gajaj kaj feliĉaj. Ilin surprizis la neatendita apero de la fiŝisto. Oni demandis lin, de kie li venis. Post kiam li kontentigis ilin per detalaj respondoj, oni invitis lin al sia hejmo kaj regalas lin per vino kaj kokajo. La novaĵo altiris multe da scivolaj vilaĝanoj.

Oni rakontis al la fiŝisto, ke dum la milito en Kin-dinastio (221-207 a. K.) ilia praavo rifuĝis kun sia familio kaj najbaroj en tiun ĉi regionon izolitan deekstere. De tiu tempo ili interrompis komplete la rilaton kun eksteraj homoj. Oni demandis al la fiŝisto, en kiu dinastio ili vivas, ĉar entute ili sciis nenion pri Han-dinastio (206 a. K.—p. K.), nek pri la dinastioj Ŭej (220-265 p. K.) kaj Gin (265-420 p. K.). La fiŝisto rakontis ĉion detale. Tiam ili ĝemspiris kun bedaŭro.

Poste oni regalas lin unu post alia per vino kaj frandaĵoj. Post kelkaj tagoj li adiaŭis ilin. Je la disiĝo oni diris al li: “Ne indas malkaŝi nin al eksteruloj.”

Fine la fiŝisto eliris de tie kaj reprenis la boaton. Reirante laŭ la malnova vojo, li markis de loko al loko la montrajn signojn. Kiam li revenis en la urbon, li vizitis la prefekton kaj rakontis al li sian aventuron. La prefekto ekspedis homojn, kiuj sekvis la fiŝiston al tiu loko. Sed vane, ili neniel povis re trovi la ĝustan vojon. Iel malaperis la antaŭe dismetitaj signoj.

Iam la nobla sinjoro Liu Zigi en Nanjang aŭdis pri la afero, kaj sin preparis por serĉi la lokon. Sed sen ajna sukceso li mortis poste pro malsano. De tiu tempo neniu interesiĝis plu pri tio.

ELPIN ELĈINIGIS

## Taŭ Juanming

*Taŭ Juanming (365-427 p. K.), alinome Taŭ Kian, estis unu el la grandaj poetoj de Ĉinio. Li vivis en mizero kaj iam laboris kiel loka ŝtaticisto. Ĉar li malkontentis pri la mal-luma reĝimo de tiu tempo, li ekŝiĝis, ermitiĝis kaj ekokupis sin pri terkulturo en sia hejmloko.*

*Liajn versaĵojn karakterizas idea ordinareco kaj lingvaj natureco kaj senartifikeco. Ili prikantas la naturan belecon kaj modestan vivon de la kamparanoj kaj kritike mallaŭdas la tiamajn maljustaĵojn en socio kaj politiko. Inter liaj verkoj, tamen troviĝas ankaŭ poemoj de pesimismo kaj luktoevitemo. Li postlasis pli ol 130 verkojn en prozo kaj versoj, kiuj estis kolektitaj en lia “verkaro de Sinjoro Ginggie”. Sian socian idealon la verkinto priskribis en “Tra la Persikfloroj” kies esperantan tekston ni donas supre.*



# Revido pri Ĉinio

WINIFRED SANDFORD,  
ANGLA ESPERANTISTINO

**E**N la jaro 1960 mi pasigis tri feliĉajn, instruajn monatojn en Ĉinio, kiel gastino de angla amikino. Mi priskribis tiun viziton en la 5-a n-ro de EPĈ, 1961. Frue en lasta jaro mi honorigis ricevi leteron en Esperanto invitantan min reveni Pekinon por labori kelktempe. Mi estas petita doni miajn impresojn denove.

Estas malfacile fari komparojn laŭ la fenomenoj, ĉar tiam estis somero, kaj nun estas vintro. Kiel antaŭe, tuj post kiam mi transpaŝis la landlimon, mi sentis min sekura, kvazaŭ en granda familio, kiu zorgos pri mi.

La malnovaj stratoj de Pekino ankoraŭ aspektas antikvaj kaj malfreŝaj, kaj la novaj stratoj ankoraŭ aspektas freŝaj kaj puraj. Estas kelkaj ŝanĝoj. Bela nova Arta Galerio estas konstruita proksima al la Antikva Palaco, kaj nova sekcio pri moderna historio malfermita ĉe la granda Historia Muzeo. En la galerioj, muzeoj kaj ekspozicioj ĉiam amasiĝas multaj homoj, ke oni devas atendi laŭvice por vidi la elmontraĵojn.

Estas multe pli da nutraĵoj ol antaŭe kaj pli da vestaro, precipe ŝuoj kaj lanŝtofoj kaj vataĵoj. Katuno porciumiĝas kaj ni ricevas kuponojn por aĉeti katanajn vestojn. Patrinoj kun junaj infanoj devas plani zorge, sed ili ne plendas. Tiom da jaroj antaŭe ili havis nek kuponojn nek monon por aĉeti vestarojn. La porciumado ne signifas, ke katuno manketas, sed tion ke pli multaj personoj portas nun pli multajn vestarojn. Oni vidas milojn da bicikloj sur la stratoj. Ankaŭ ili porciumiĝis kiam mi restis ĉi tie antaŭe. Nun iu ajn povas aĉeti biciklon ĉe la vendejoj. Amikino diris, ke ĉar Pekino estas ebena urbo, la biciklo estas populara; sed, amiko ĵus alveninta el suda kampara regiono diris al mi, ke ili egale abundas en la kamparoj. Mi pensas ke ili multkostas; sed kompare kun la salajroj, la ĉinoj ne sentas la kostecon.

Antaŭ ne longe mi vizitis kamparan komunumon kaj vidis ke tie ĝi produktas iom da nutraĵo. Ĝin alportas al urbego en la nokto kaj frua mateno la lojalaj, laboremaj triciklistoj, aŭ ĉaruloj, sinkovrantaj en ŝafpeltaj paltoj, portantaj peltĉapelojn kun grandegaj oreloklopoj, per siaj veturigiloj kun grasaj, persistaj azenetoj, trankvilaj ĉevaloj aŭ komplezemaj bovoj. La komunumo situas en ebena kamparo ekster Pekino, proksimume 13 km. de ĝi kun ĉirkaŭ 13,000 loĝantoj (3,437 domanaroj). La administranto fiere montris al ni la novan irigacian maŝaron, kaj diris al ni kiel ili travivis "la katastrofajn jarojn", la

lastajn tri malbonajn jarojn. Li diris al ni pri rikoltoj, kaj senpluvecoj kaj inundoj (la pluvo de unu jaro falis dum du tagoj!), kaj donis al ni statistikojn pri produktaĵo, kaj parolis pri rizo, tritiko, maizo kaj batatoj, anasoj, porkoj kaj fiŝoj. Ni iris al unu el la vilaĝoj, konsistanta el 93 domanaroj. La hejmoj, en la okuloj de okcidenta laboristino, ŝajnis kortuŝe malriĉaj kaj malplenaj, kaj havis malmultajn agrablaĵojn, . . . ne helan koloraĵon, elektrajn fornojn, lavmaŝinojn aŭ kahelajn banĉambrojn. . . . Sed, ree, ĉio estas relativa. Antaŭ 14 jaroj oni ne povis vidi en la vilaĝoj, ke la maljunuloj estas sidantaj ĉirkaŭe, fumantaj longajn pipojn, aŭ la maljunulinoj estas ludantaj kune kun varme vestataj paŝetuloj. Tiam la lernejaĝaj geknaboj ne estis en la lernejoj des pli ne en iu universitato. Pri senpaga san-zorgo oni tiam eĉ tute ne konis. Sed la maljunuloj estis mortantaj de malvarmo, kaj la infanoj, analfabetaj. Ni demandis al kelkaj virinoj, kiuj ŝajnis feliĉaj interbabili: "Ĉu vi estas kontentaj?" La respondo estis ĉiam la sama: "Ni havas ĉiutage tri bonajn manĝojn." Iu sinjorino levis sian katunan jaketon kaj montras la varman lanan vestaron kiun ŝi portis. "Mi neniam havis tiel bonan vestaron," ŝi diris. Poste ŝi diris al ni ke ŝiaj edzo kaj frato eĉ havas peltpaltojn. Tio estas unu el la mezuriloj de prospero en ĉi tiuj malvarmaj nordaj vilaĝoj. Depost la Liberiĝo en tiu vilaĝo oni aĉetis 75 peltpaltojn kaj 83 horloĝojn. 30% el la domoj estis rekonstruitaj kaj 70 novaj ĉambroj aldonitaj al la malnovaj dometoj. Antaŭe estis nur 5 lanaj paltoj en la tuta vilaĝo; nun estas 95. Ili havas 35 biciklojn kaj 18 radiaparatojn; ili havas ankaŭ novajn plugilojn kaj "lumon sen la uzo de oleo".

Ni parolis kun la edzino de antaŭa bienulo. Ŝia domo estis pli granda ol la aliaj sed ne pli komforta. Ŝi havis plurajn infanojn en la lernejo; ŝia edzo estis laboranta en la kampoj. Ŝi turniĝis al ni por informi nin, ke ŝi posedas bonan grandan porkon . . . kaj ŝia vizaĝo radiis brilan feliĉon.

Oni supozas ke la komunumoj havas siajn malfacilaĵojn. Ĉu ni ĉiuj ne havas iun ĝenon? Sed la malkleruloj de malproksimaj landoj, kiuj kraĉas kontraŭ la komunumoj, skribas kalumniajn artikolojn pri ili, ja neniam sentis la mankon de unu manĝo aŭ vivis sen jaketo dum vintro, aŭ malhavis la eblecon iri lernejon. Kaj, ĉu ni ne konas iujn lokojn (kie ne estas komunumoj) kie homoj ne havas tri satmanĝojn tage kaj regulan kreskon de ilia ĉiujara enspezo? Eble malriĉa dometo estas plibona ol nenio, kaj universitata edukado (se vi dezirus ĝin) pli bona ol analfabeteco.

# Nia Bela Hingiang

Popola melodio de Hingiang

Teksto de Ma Hanbing


Traduko de Laulum

Adage, bele kaj gaje kun amo

Soprano korifeino *mf*



Bo- nas ni- a Hin- giang be- la Kun paŝ- te- ĵoj her- bo- ri- ĉaj  
 O- ras spi- koj kun a- ro- mo Kaj sin mon- tras dom- bes- ta- roj  
 So- nu jam mu- zik' de dom- bro\*, Kaj dan- ca- do tuj ek- vi- glu



am- baŭ- flan- ke sub Tian- ŝan, La Go- bi\*\* i- ĝis tre fruk- to-  
 je vent- blo- vo al la her- bar', Dol- ĉas ni- aj fru- ktoj  
 ku- ne kun la kan- ta tondr', De l' na- ci- oj ni- a so- li-



do- na ter', Kaj neĝ- su- ko flu- as fon- to de vi- no kaj pan'.  
 kun re- nom', Kaj a- bun- das ĉi- e kar- bo, o- ro kaj ŝtal'.  
 da- ra rond' Kan- tas pri l' gvi- dan- to Maŭ Ze- dong.

Soprano

Kontralto


Tenoro

Baso




He He He Kaj neĝ- su- ko font' de  
 Ĉie a- bun- das kar- bo,  
 Kan- tas pri l' gvi- dan- to

La Go- bi' i- ĝis tre fruk- to- do- na ter',  
 Dol- ĉas ni- aj fru- ktoj kun re- nom',  
 De l' na- ci- oj ni- a so- li- da- ra rond'



Laj laj laj laj laj laj laj laj



vin' kaj pan'.  
 or' kaj ŝtal'.  
 Maŭ Ze- dong. laj



vin' kaj pan'.  
 or' kaj ŝtal'.  
 Maŭ Ze- dong. Maŭ Ze- dong.

\* Speco de pluka kordmuzikilo de la kazaĥoj.

\*\* Granda dezerto en Hingiang, Ĉinio.



laj laj laj laj laj laj laj laj laj

He

laj laj laj laj laj

*mf*

Ni-a kam-pa-ro es-tas be-la ĝar-den'. Ni-a hej-m-lo-ko es-tas

laj laj

Ni-a hej-m-lok' 'stas Ter-e- Ni-a

ve-ra Ter-e-den'. Ho!

de-no. Ni-a hej-ma Ter-e-den'. es-tas be-la'

ve-ra Ter-e-den' Ni-a kam-pa-ro be-la

1.2.

ĝar-den'. Ni-a hej-m-lo-ko es-tas ve-ra Ter-e-den'.

Ho! Ni-a hej-ma Ter-e-den'.

3.

ĝar-den'. Ni-a hej-m-lo-ko es-tas ve-ra Ter-e-den'.

Ho!'


## II. ELEMENTAJ TAKTIKOJ

Vejĉio esence estas ludo de strategio. Tamen ne malpli gravaj estas la taktikoj por sukcesigi la strategion. En tiu ĉi parto estas traktataj taktikoj elementaj kaj oftaj de vejĉio.

### I. Eterna Persekutado

Ĝenerale se iu grupo de ŝtonoj sukcesis sin savi el la minaca situacio, ĝi havas tri liberajn punktojn ĉirkaŭ si. Sed kelkfoje okazas situacio, ke la persekutata grupo havas ĉiam nur du liberajn punktojn, kaj ĝi estas ĉiam persekutata.

Diag. 31



En la maldekstra supra figuro de diagramo 31, la blanka grupo (la ŝtonoj B10, B11 kaj C11) ŝajnas esti jam ekster danĝero. Sed se la nigra flanko metas ŝtonon ①, ĝi estas denove minacata, kaj devas klopodi sin savi per ŝtonmeto ②. Se la ludo tiel iros plue, la tuta blanka grupo estos forkaptita, kiam ĝia lasta ŝtono estos metita ĉe la limo de la vejĉi-tabulo.


La rezulto certe ege favoros la persekutantan flankon, kiu per tio ne nur konkeros grandan teritorion, sed ankaŭ dismetos siajn ŝtonojn en longa vico, kiu donos grandan influon al la evoluo de la ludo.

Sed se sur la vojo de persekutado (vidu la mezan figuron de la diagramo) troviĝas ŝtonoj de la persekutata flanko, la lasta povas facile sin savi per helpo de tiu(j) ŝtono(j). (vidu la malsupran figuron de la diagramo). En tia okazo, la persekutinta flanko povas esti atakita de dudirekta minaco je ambaŭ flankoj, ekz-e en la punktoj A. B. C. Ĉ. . . k. s. Tial faronte "eternan persekutadon" oni devas bone observi, ĉu la vojo de la persekutado estas tute libera aŭ ne.

### 2. Pordo


"Pordo" estas taktiko uzata por gardi la malamikan grupon de eskapo. Ĝi minacas la lastan ne tuj apude, sed per ŝtonmeto iom aparta kvazaŭ pordo ĉe la vojo, ke la kontraŭa flanko ne povu eskapi el la enfermiteco. En diagramo 32 estas la plej simpla formo de "pordo". La nigra ŝtono A estas en la situacio de "eterna persekutado". Sed ĉar sur la vojo troviĝas nigra ŝtono B, tiu taktiko ne povas esti aplikata de la blanka flanko. Tamen se ĝi faras "pordon" ①, tiam la nigra ŝtono same ne povas eskapi.

Diag. 32



La "pordo" ankaŭ povas esti iom larĝa (vidu diagramojn 33 kaj 34) kaj preni iom variajn formojn (vidu diagramojn 35 kaj 36).

Diag. 33







### 3. Dudirekta Minaco

Dudirekta minaco signifas minaci per unu ŝtonmeto samtempe du grupojn de la kontraŭa flanko, tiel ke la lasta devas fordoni unu el ili. Tion ni jam preparolis ĉe la fino de la ĉapitro de "eterna persekutado". Lertaj vejĉi-ludantoj povas aranĝi tian dileman situacion por la kontraŭa flanko, krom en la situacio de "eterna persekutado".


Diag. 34




Diag. 35



Diag. 36



Diag. 37



En diagramo 37, la enfermita nigra grupo havas ŝajne jam lokon por du okuloj. Se la blanka atakus unue je ② aŭ ③ la nigra facile farus du okulojn per ŝtonmeto je ①. Sed nun la blanka flanko unue metas ŝtonon ①. Se la nigra flanko ne tuj respondus per ②, tiun punkton okupus tuj blanka ŝtono, kaj estiĝus tiam situacio de dudirekta minaco, kaj kaptiĝus aŭ la du supraj ŝtonoj aŭ la du dekstraj. Se la nigra okupas la punkton ②, la blanka tuj detruos la alian okul-lokon je ③, kaj per tio detruos fine la tutan nigran grupon.

## Ĉina Diabolo

### GI ĜIGUANG

Diabolo estas tre populara ludilo en Ĉinio, akrobata arto kaj precipe la infanoj ŝatas sin ekzerci per ĝi en vintro.

Antaŭ du mil jaroj oni jam faris noton pri ludo de diabolo en nia lando. En la komenco de 7-a jarcento p. K. tiu ludo tre furoris. Tiutempe, dum la Printempa Festo okazis en ĉefurbo prezento de diabolo-ludo kun 5,000 partoprenantoj. Kia spektaklo!

Lastatempe tiu ludo estas multe disvolvita de akrobatoj. Tian Ŝuangliang, fama aktoro de la Ĉina Varietea Trupo, povas nin

regali per pli ol 90 variaj ludoj per ĝi. Li povas ĵeti la diabolon ĝis la altecon de pli ol 10 m. kaj ĝin precize kapti per la ŝnuro. Li ankaŭ povas ĵeti la diabolon horizontale for de si kaj revenigi ĝin sur la ŝnuron per mansigno. Li ĝin ludas ne nur variriĉe sed ankaŭ kun graciaj gestoj tiel ke lia prezentado estas ĉie multe aplaŭdata de la spektatoroj. Kiam la Ĉina Varietea Trupo faris prezentadon en Japanio kaj Latinameriko, ankaŭ la prezento de diabola ludo estis unu el la tre ŝatataj programeroj.





## Anstataŭ Enkonduko

Jen nova parto de nia gazeto por novaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne finis la komplet-ig-an kurson en la lernado. Por faciligi ilian legadon, en tiu ĉi parto la tekstoj estas redaktitaj en plej simpla kaj klara lingvo, kaj la vortoj estas lim-ig-it-aj supoze je ĉirkaŭ 1,200 vort-radikoj. Al nepre necesaj vortoj ekster tiu ĉi lim-ig-o ni donas klar-ig-ojn en aparta angulo "Nia Vortareto" de tiu ĉi parto, kaj al tiaj vortoj ni al-donas stel-ton en la teksto.

Kompren-ebl-e ni zorgas ankaŭ tion, ke la materialoj ne estu tute sen-interesaj al malnovaj esperantistoj.

Ĉu ni sukcesos? Ni provu.

— LA REDAKCIO

NOFHAN:

## Letero al Malproksimaj Geamikoj (I)

Karaj geamikoj,

Vi ofte diris, ke vi tre volas vidi Ĉinion propra-okule kaj koni ĝin pli bone. Sed tion ne permesas viaj nunaj okupoj, kaj tio ne povos efektiviĝ-i en proksima estonto. Vi petis mian helpon por iel kontentigi tiun vian deziron.

Kion mi povas fari? Mi ne havas super-homan povon por gvidi vin viziti Ĉinion en la sonĝo. La sola ebla rimedo por ni ambaŭ estas la korespondado. Se vi konsentas, mi volas doni al

vi klar-ig-ojn pri nia lando ekde tiu ĉi letero.

## Ĉinio, Lando en Azio

Jen la unua temo kiun mi volas sciigi al vi.

Ĉinio estas lando en la orienta parto de la azia kontinento. Oriente de ĝi estas maroj de la Pacifiko\*. Troviĝas en tiuj maroj pli ol 5,000 insuloj apartenantaj al Ĉinio. La plej granda el ili estas Tajvan-insulo, kiun ankoraŭ okupas la usonaj imperi-ist-oj.

9,600,000 kvadratajn\* kilometrojn\* da teritorio Ĉinio havas. Tiu spaco estas nur iom malpli granda ol la tuta Eŭropo. Por traveturi la landon de la suda urbo Kantono ĝis la norda urbo Manĝouli per rapida vagon-ar-o kaj sen halto sur la vojo, oni bezonas ses tutajn tagojn kaj ok horojn.

En la vasta teritorio troviĝas lokoj en la varma zono kaj ankaŭ lokoj en la malvarma zono. Kiam en la norda parto de Ĉinio ankoraŭ neĝas, en la sudaj provincoj disfloras jam floroj. Tial en Ĉinio kreskas mult-specaj kreskaĵoj. Tio donas favoran kondiĉon por ter-kulturo.

La plej alta montaro Himalajo troviĝas en la sud-okcidento kaj la famaj Jangzi-rivero kaj Flava Rivero tra-kuras la landon de okcidento al oriento.

Tre riĉaj estas la sub-teraj riĉfontoj en nia lando. Same estas ankaŭ la petrolaj\* kampoj. Nun la petrolo produktita en Ĉinio jam esence sufiĉas por nia enlanda uzado.

Grandan loĝ-ant-aron havas nia lando. Laŭ nombr-ad-o en 1957, en la tuta lando troviĝas 650,000,000 loĝ-antoj. La meza dens-eco de la loĝ-ant-aro estas 68 personoj en ĉiu kvadrata kilometro. Sed en la orienta parto la dens-eco estas multe pli alta, kaj male en la okcidenta parto.

Ĉinio estas lando kun multaj nacioj. Krom la plej mult-nombra Han-nacio troviĝas ankaŭ pli ol kvindek aliaj. Ilia tuta anaro estas ĉirkaŭ 38,000,000. Pri ili ni parolos iom poste.

## Rakontoj pri Afanti


### Kia Manĝemo



Foje Afanti manĝis kune kun aliaj, el kiuj iu riĉulo intencis lin rid-ind-igi. For-manĝinte akvome-lonon,\* la riĉulo metis la rest-ig-itajn ŝelojn antaŭ Afanti kaj diris al la ĉeestantoj: "Vidu, amikoj, kian manĝemon Afanti havas! Li manĝegis plimulte ol ĉiuj aliaj! Nur vidu, kiel granda amaso da ŝeloj estas antaŭ li!"

"Manĝegis ne mi, sed li," diris Afanti montrante al la riĉulo. "Mi restigis almenaŭ la ŝelojn, sed li formanĝis eĉ ankaŭ tion! Rigardu, se vi ne kredus."

### Lupas\* la Mastro, Lupas Ankaŭ la Hundo



La distrikt-estro ordonis, ke Afanti havigu al li hundon, kiu pretas ataki ĉiun al-proksimiĝanton. Sed Afanti trovis por li hundon, kiu timeme for-kuris de ĉiu alvenanto. La distrikt-estro forte koleriĝis kaj diris, ke li estas



sentaŭga malsaĝulo. Tiam Afanti argumentis sen rapidemo:

“Trankviliĝu, sinjoro distrikt-estro! La popolo diras: Lupas la mastro, lupo ankaŭ la hundo. Vivinte ĉe vi tri tagojn, eĉ hundo sen-dent-iĝinta ekpovos ataki kaj vundi homojn.”

## Birda Lingvo



“Mi komprenas la birdan lingvon,” fiere asertadis Afanti, kaj liaj vortoj atingis la reĝon. Iutage, la reĝo invitis Afanti ĉasi kune kun li. Survoje ili preterpasis preskaŭ disfalintan ĉirkaŭmuron, en kies unu truo nestis strigo\*.

“Aŭskultu,” diris la reĝo al Afanti aŭdinte kriaĉon de la nokto-bird-aĉo, “kion ĝi diras?”

“Ĝi diras,” respondis Afanti, “ke se la reĝo daŭre sub-premados la popolon senkompatate, lia regno baldaŭ disfalos kiel ĝia nestaĉo.”

# Ŝafisto kaj Lupo

## Fablo

Lupo salutis ŝafiston dirante:

“Kara sinjoro, ni ambaŭ estas infanoj de Dio, do ni amu unu la alian. KREDU min, ke mi havas plej intiman sang-rilaton kun la ŝafoj. Mi estas tre maltrankvila pro ilia malforteco, kaj ilin helpi por fortiĝo ja estas mia sankta devo. Kara sinjoro, se mi faris al vi malagrablan impreson en la pasinteco, tio estis nur pro miskompreno. Mi povas montri al vi mian tutan hararon. Jen ĉiuj miaj haroj blankiĝis. La neĝ-blanka koloro ja montras, ke mi



jam fariĝis sam-famili-ano de la ŝafoj. Se vi bonvolus kredi min, kara sinjoro, mi estus preta fari al vi servojn. Vi povas konfidi al mi la tutan ŝafaron. . . .”

“Ŝanĝiĝis via hararo,” ĝin interrompis la ŝafisto, “sed ne la

ungoj\* kaj dentaro. Kaj la sperto bone min instruis, ke pli ruzas lupo blanka ol lupo griza.”

Tion dirante, la ŝafisto levis kontraŭ ĝi sian bastonon.

**Memoru:** Pri lupo kun ŝanĝita hararo, atentu pri la ungoj kaj la dentaro.

## NIA VORTARETO



**Akvo-melono** — Granda akvorica frukto.

**Kilometro** = mil metroj.

**Kvadrata** — En formo kvarangula kies kvar flankoj kaj kvar anguloj estas egalaj.

**Lupo** — Sovaĝa besto simila al hundo.

**Pacifiko** — Nomo de la plej vasta mar-eg-o inter Azio kaj Ameriko.

**Petrolo** — Grasa fluajo eltirita el sub la tero por lum-ig-ad-o, hejt-ad-o kaj funkci-ig-o de motoroj.

**Strigo** — Nokto-birdo.

**Ungo** — Akra malmola parto ĉe la fino de fingro.



(Daŭrigo de p. 142)

## LA JENAJ HUNGARAJ GEESP-ISTOJ DEZ. KOR. KUN ĈL. PRI ĈT.:

\* Marta Bartus, tajpistino, Budapeŝt, XV. Pisztrang u.3.

\* Olga Bajan, 25-j., Budapeŝt IV. Petofi u.32.

\* Edit Nagy, Budapeŝt IV. Pozsonyi u.9.

\* Suzan Steiner, Budapeŝt XI. Irinyi Jozsef u.21.VII.e 5.

\* Arpad Vaczi, Budapeŝt XIII. Tahi u.36.

\* Eva Koltai, studentino 18-j., Budapeŝt, IV. Virag u.46/a.

\* Maria Koltai, studentino 18-j., Budapeŝt, IV. Virag u.46/a.

\* Ilona Kabai, studentino 18-j., Budapeŝt, IV. Mundasotthon u.17.

\* Katalin Kligl, studentino 18-j., Budapeŝt, IV. Pozsonyi u.8.

\* Maria Mentsl, oficistino 18-j., Budapeŝt, IV. Chinoi u.38.

\* Katalin Nagy, studentino 18-j., Budapeŝt, IV. Klara u.10.

\* Vera Csomos, studentino 18-j., Budapeŝt, XV. Eotvos u.102.

\* Margit Lakatos, 21-j., Budapeŝt XV. Pisztrang u.3.

\* Bottlik Margit, 18-j., Alsogod, Godpuszta.

\* Suzana Szanto, 22-j., Budapeŝt IV. To u.38.

\* Katalin Sipocz, 19-j., Budapeŝt VII. Landler J.u.7.

\* Suzana Hidas, 22-j., Budapeŝt XIII. Mautner S.u.57/b.

\* Elizabeto Kenessy, 19-j., Budapeŝt IV. Nap u.22.

\* Helena Gyarmati, 17-j., Maglod, Hock Janos u.14.



## La Rakontoj Plaças

Treege plaças al mi la rakontoj pri la homaj interrilatoj "Dato por Geedziĝo", "Gingjang-Monteĝo" kaj aliaj.

Samtempe vi donadas tre interesajn novaĵojn pri la Esp. movado. Mi ĉiam montras la novan numeron al miaj gekursanoj. Mi eĉ tralegis la rakonteton pri ĉasado de tigroj.

Tre belaj estas la eksteraj folioj de la revuo kun ĉarma bildo, kiun ni ĉiuj longe, longe rigardadas.

G. SIMEONOV, BULGARIO

## Pri Nova Maniero de Redaktado

Mi ricevis la 1-an numeron, kiun mi legis kaj relegis. Amuza, instrua, interesa kaj ŝatinda la gazeto estas, eĉ sub la arta vidpunkto.

Ĉar funde de la artikolo "Por nova venko en la nova jaro" vi antaŭanoncis estontajn raportadojn pri ĉefaj temoj rilatantaj Ĉinion, kaj demandas ĉu tia maniero de redaktado estas aŭ ne bonvena. Mi respondas: "Jes, ĝi estos bonvena", eĉ, mi dirus, necesa, ĉar mi opinias ke Ĉinio ekvekis intereson ĉe ni kaj okcident-eŭropanoj.

Do, estu bonvena la unua raporto pri "la popolkomunumo".

Miaflanke, mi ŝatus koncentran priskribon pri la nuntempaj enlandaj komunikiloj (vojoj, fervojoj, ŝip- kaj aviad-linioj).

G. BARBIERI, ITALIO

## Familia Revuo

Kiel mi jam diris al vi, mi bone profitas tiujn revuojn ĉe Esp. kluboj. Ĝi estas grava propagandilo de nia movado kaj samtempe informas nin pri la progresado de la nova Ĉinio . . . . kaj nun ĉe la esperantistaro de tiu ĉi regiono en kiu mi loĝas "El Popola Ĉinio" jam estas familia revuo.

O. KASTRO B, BRAZILO

## Unualoke EPĈ

Certe interesos vin ekscii, ke enketo en la Oakville-Klubo, kiujn gazetojn la klubanoj prefere legas, montris, ke ili preferas unualoke "El Popola Ĉinio", pro la facile legebla lingvo.

R. EICHHOLZ, KANADO

## Admiro por Gravuraĵoj

La preslitteroj kaj la heleco de la papero estas bonaj, tre bonaj, eĉ kaj precipe pri la legado fare de maljunuloj. Certe, mi ŝatas belajn fotografajojn kaj plurkolorajn bildojn aŭ fotografajojn, sed mi admiras la multajn gravuraĵojn, la etajn kaj la malpli etajn. Kiom da delikataj detaloj en ĉiu el ili! Iafoje mi restas admireganta antaŭ unu aŭ alia. Por ni, pli aŭ malpli latinoj, tiuj gravuraĵoj bonege karakterizas la stilon kaj la paciencon ĉinajn.

R. MATHIEU PLUMHANS,  
BELGIO

## Ĉiuspecaj Materialoj

La gazeto EPĈ estas unu el la interesaj revuoj, kiu donas ĉiu-

specajn materialojn. Ĉinio estas la lando, kies alta kulturo estas konata de plej antikva tempo. Tie estis inventitaj la unua kom-paso, porcelano, silkajoj, delikataj tre artecaj skulptaĵoj el eburo kc. Kaj mi dezirus pli detalan priskribon pri tio en la gazeto.

Krom tio mi estus tre ĝoja, se la gazeto aperus 12-foje dum la jaro.

LEGANTO A. N., SOVETIO

## Garantio de Sukceso

Via revuo EPĈ multe interesas la esperantistojn el ĉiuj tendencoj. La grandioza revolucio de via popolo, la energia sinteno de viaj gvidantoj, tiom da faktoj kapablas altiri konfidon al via nova ŝtato. La fervorego de la amaso laborista al progreso antaŭen estas garantio de la sukceso de iu ajn plano ellaborita, tiel en la nuna tempo, kiel en la estonteco.

CLERC-CLOVIS, FRANCO

## Ni Kondolencas pro la Forpaso de A. A. KOĤ

Ĵus ni ricevis funebran informon el Sovetunio, ke mortis en sia 77-jara aĝo je la 18-a de januaro, ĉijare k-do A. A. Koĥ, la fidela, sincera batalanto por kaj per Esperanto, en Lvov, Ukrainio. Li estis amiko de la Zamenhof-familio kaj fidela, helpema kunlaboranto de nia gazeto. Lia forpaso ege nin ĉagrenas. Ni sendas al liaj familianoj kaj liaj kunbatalantojn nian elkoran kondolencan.

Ĉina Esperanto-Ligo  
Red.de El Popola Ĉinio





## ESPERANTO EN PLIAN UNIVERSITATON

Ekde tiu ĉi semestro Esperanto estas instruata ankaŭ en la Pekina Universitato, la plej fama kaj plej longhistoria universitato en Pekino. Ĝi estas instruata kiel dua fremda lingvo al studentoj de la fakultatoj koncerne lingvistikon. Lernado de tiu ĉi nova objekto daŭros tri semestrojn, kaj ĝi okupas 4 horojn ĉiusemajne.

## STUDRONDO "ORIENTO"

En majo de lasta jaro studrondo "Oriento" fondiĝis en Pekino en la Komitato por Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo. Ĝi konsistas el ses junuloj-komencantoj, kiuj komencis lerni Esperanton antaŭ dek monatoj. Kun granda intereso kaj diligento ĉiuj ĝiaj rondanoj lernas Esperanton. Ĉiuj jaŭde vespere ili kolektiĝas kaj kune lernas, interparolas esperante kaj legas leterojn el eksterlandaj amikoj. Ekde junio de la pasinta jaro ili jam korespondis kun eksterlandaj esperantistoj. Nun ili korespondas kun 59 geamikoj el 19 landoj. Ili esperas, ke ilia internacia korespondado alportos utilon kaj al la starigo de amikeco inter diversaj popoloj kaj al la praktiko kaj lernado de la internacia lingvo.

## E-MOVADO EN VJETNAMIO

Okaze de la novjara renkontiĝo de vjetnamaj geesperantistoj ĉe Hanoja Esperanto-Klubo, samideano DAO ANH KHA faris raporton pri la movado en 1963, kaj pri la agadplano por 1964.

Ĉeestis la renkontiĝon reprezentantoj de Vjetnama Packomitato, de Solidareca Azi-Afrika

Komitato de Vjetnamio kaj de Vjetnama Patrolanda Fronto, krom pli ol 100 geesperantistoj de la ĉefurbo kaj provincoj.

Rimarkindaj estas kelkaj antaŭenpaŝoj en 1963:

**RILATOJ:** VPEA starigis kontaktojn por kulturaj kaj amikecaj interligoj kun pli ol 80 landoj kaj kun dumil gesamideanoj tra la mondo.

**ELDONLABORO:** VPEA eldonis la junian numeron de PACO (1963) je trimil ekzempleroj kaj disdonis 500 okaze de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio. Ĝi eldonis la *Duagradan Esperanto-Lernolibron* por vjetnamoj kaj reviziis kaj ampleksigis la *Unuagradan Esperanto-Lernolibron* por reeldono en la jaro 1964. Ĝi starigis ankaŭ komisionon por la kompilado de *Vjetnama-Esperanta Vortaro*.

La membroj de VPEA kunlaboris kun Ŝtata Fremdlingva

Eldonejo por aperigi 6 numerojn de *Vjetnamio Antaŭenmarŝas* (1963) kaj 3 librojn — *La Aventuroj de Zemen*, *Senelirejo* kaj *La Lasta Altaĵo*.

**ORGANIZO KAJ PROPAGAND-AGADO:** VPEA kunvokis regule ĉiumonatan kunvenon de siaj membroj ĉe Esp-klubo de Hanojo, organizis 5 prelegojn kaj aranĝis 5 ekspoziciojn.

Laŭ informo de VPEA

## LA 10-A E-EKSPOZICIO EN INDONEZIO

Ĉe la fino de aŭgusto, lastjare okazis en Jogjakarta de Indonezio la 10-a Esperanta Ekspozicio de tiu lando. Ĝi estis bone aranĝita kun libroj, gazetoj, leteroj, kovertoj, poŝtkartoj kaj bildkartoj de la tuta mondo. La vizitintoj estas multe interesitaj de la amikeco inter la esperantistoj en diversaj landoj. La bildo montras parton de la ekspozicio. Staras dekstre s-ro Yazis Widjajakusuma, la prezidanto de la Konferenca Komitato de IEA, kaj maldekstre, s-ro Sri Soedono Pr, la sekretario kaj gvidanto de la ekspozicio.

Laŭ informo de K.K. de IEA





# HOMO SUR NIA LIBRORETO

**STELLAN ENGHOLM: HOMOJ SUR LA TERO** — Represita romano kun enkonduka skizo de Ferenc Szilagy pri la aŭtoro, kovrilo de David Hastie Young, eldonis STAFETO, 16.5 x 22.5 cm., 236 p. plus 4 bildpaĝoj. Prezo: US\$ 2.00 (broŝ.) kaj US\$ 2.80 (Tolbind.).

Reeldono de iu libro ofte signifas mem ĝian tempe-provitecon. Jen regulo reganta ankaŭ en la esp-a eldonado. El la grava E-eldonejo STAFETO eliras jen kaj jen legindaj verkoj, sed el ili la senskrupule rekomendindaj plej ofte estas tiuj represitaj. *Homo sur la Tero* estas libro tia.

La romano havas nek kompleksan intrigon, nek heroojn senmortajn, sed simple tri generaciojn de simplaj terkulturistoj. Tamen per tio la aŭtoro iel respegulis faceton de la sveda socio.

Kristoforo, posedanto de bieno kaj arbaro, plene absorbiĝis je siaj posedaĵoj, kvazaŭ li havus nenian alian ambicion ol vivi tiel ĝis la morto. Ankaŭ pri la edzino kaj la filo li malmulte zorgis. Nur iufoje li estis incitita de iu propono pri arbara negoco. Tio donis al li la ideon rekonstrui la domon de la bieno. Tamen el tio rezultiĝis nur stalo rekonstruita, kaj nenio pli. Lignopecoj estis kolektitaj sed la domo restis ekstermoda. Fine en tiu medio li fermis siajn okulojn por ĉiam.

Juna Kristoforo estis nova heredanto de la bieno. Ŝajne lin obsedis la pesimisma filozofio pri la vivo kaj la mondo. Antaŭe li malrapideme sed pacience laboris en la patra bieno, sed nun li trovis tion sensenca. Li volis vivi decan vivon anstataŭ ĉiam sin klini sur la tero kaj senti la

gluiĝon de la kampa tero sur la plandoj. Tial li decidis forvendi la bienon kaj la arbaron kaj foruzi la tutan bonhaston dum sia vivo. Tio kondukis lin al senbridaj festenoj, hazardludoj, spekulacioj, kaj la bonhasto konsumiĝis pli rapide ol lia origina plano. Kiam la financa stato ne permesis al li tian vivon, li devis retiriĝi denove al sia malnova domo.

Al Eskil, la nova generacio, la aŭtoro ŝajne volis doni sian plej bonan esperon. Li, naskiĝinta kvazaŭ en soleca kaj eĉ senpatra medio, nutris en si jam de sia infanaĝo sufiĉe belan revon pri la tero kaj pri la naturo ĝenerale. Lia scivolemo kondukis lin al ĉiam pli vasta mondo. Kio pli okulfrapa estis, ke al la homoj li havis pli da kunsentoj kaj komprenemo, kaj eĉ amo al sia fianĉino, kio estis absolute kontraŭa al liaj antaŭaj generacioj.

Post migrado por vivopanoj en diversaj lokoj, li fine revenis sian hejmon kaj helpate de la patrino reaĉetis la bienon. Jen "feliĉa fino", kiel la kutima fino de la ĉinaj klasikaj romanoj.

## **POLA GDANSK-RADIO EN ESPERANTO**

La 9-an de decembro 1963 la sendstacio de Pola Radio en Gdansk dissendis sian 130-an 15-minutan programon pri Esperanto kaj en Esperanto — komencante samtempe la 4-an jaron de E-disaŭdigoj (la unua estis 8.XII. 1960). La disaŭdigoj okazas ĉiulunde je la 7.15 laŭ pola vintra tempo (matene!) sur la mezondoj 230m en normala programo. La Redakcio de Esperantaj Dissendoj bezonas konstantajn informojn pri vivo esperantista kaj dank- kaj gratuleterojn. La adreso: Pola Radio Gdansk, Pollando.

Laŭ informo de

JOZEFO TOEZYSKI, Pollando

## **NOVA E-REVUO EL BULGARIO**

Eldoniĝis nova E-Revuo el Bulgario. La titolo estas RIPOZOJ.

Ĝi estas esperanta eldono de la samtitola revuo jam en la lingvoj rusa, germana, angla kaj franca. La karaktero estas turisma. Konforme al la karaktero, ĝi estas lukse presita kun bonkvalita papero, granda formato kaj multkolora riĉe ilustrita preso. Adreso de la Redakcio: Bulvardo Tolbuĥin, 51, Sofio, Bulgario.

## **KULTURA SEMAJNO EN FRANCO**

Franca Unio por Esperanto decidis organizi kulturalan semajnon de 1964 en la kastelo Gresillon, de 31, mar. ĝis 7, apr., sub la aŭspicioj de Ministerio pri Nacia Edukado.

La Semajno enhavos tre riĉan programon. Krom interkonatiĝo de la partoprenantoj kaj la esperantaj aranĝoj, troviĝas ankaŭ sciencaj raportoj kaj projekcio de

multaj diapozitivoj kun sonbendoj samtempaj.

## **UNUA ESP-A KONGRESO EN FRANCO**

Post pluraj sukcesaj landlimaj kaj regionaj renkontiĝoj, la franca nacia kongreso de Esperanto estas decidita okazi unuafoje en la kadro de la internacia komerca FOIRO DE PARIZO (16-18an de majo 1964).

Laŭ informo de

L. Giloteaux (UEA-FD)

## **VOJAĜ-SISTEMO POR ESP-ISTOJ**

Internacia Turisma Centro en Nederlando iniciatis antaŭ ne longe tute novan sistemon de vojaĝo speciale por esperantistoj. Ĝi estas rondvojaĝo al serio da vizitindaj lokoj. Oni povas ĝin partopreni komence de ĉiu ajn



Verŝajne la aŭtoro volis per tiu ĉi verko priskribi sian amatan kaj plibone konatan medion en Svedio. Li donis kun simpatio kritiketon sed sopiran rememoron al la pasinteco, la unua generacio de la romano, kaj profundan bedaŭron al la lasta epoko. Nur de la nova generacio, kiu heredis la plej esencan karakteron de la avo kaj korektis la eraron de la patro, li atendis brilan promeson.

Por tiu tezo li kreis sukcese ne nur la heroojn de la tri generacioj, sed ankaŭ iliajn kunulojn en la hejmo kaj en iliaj societoj. La lingva majstreco de la aŭtoro multe helpas al la arta kreado.

Tamen mankon oni ankaŭ povas senti finleginte la lastan paĝon.

Tri generacioj certe signifas longan historion. Ankaŭ la aŭtoro volis tion reliefigi en sia verko, por ke ĝi akordiĝu kun la evoluo de la socio. Tamen tiu ĉi klopodo ne estis tre sukcesa. Oni povas percepti la historian fonon nur de la palaj aludoj de la Unua Mondmilito. Kaj la ŝanĝo de la mondo estas apenaŭ tuŝita en la tuta verko, kvankam

loko en la serio, tamen li povas viziti same ĉiujn lokojn en la serio. Per tia aranĝo estas eble por la vojaĝantoj ĝui esprantistan akompanadon kaj praktikadon de Esperanto dum la vojaĝo. La


la figuroj de li kreitaj iom diferencas unu generacion de la alia. Tamen tio verŝajne havas nenian rilaton kun la evoluo de la socio. Tial kvankam mi tre ŝatas la libron, mi dubas ĉu ĝi realisme spegulis la vivon de la terkulturistoj en Svedio. Krome, al la veraj kampuloj, t. e. la kamlaboritoj li donis nur fantomajn menciojn, kvazaŭ ili ludus nenian rolon en la vivo de la socio.

Ĉiel ajn la libro estas verko leginda, kiam en la esperanta literaturo furoras ankoraŭ verkoj sangmankaj, kiuj plej ofte tendencas apartiĝi de la vivo aŭ heroldas la sentimentalecon de la agonianta socia klaso.

HONFAN

**LA VIVO DE D-RO L. L. ZAMENHOF EN BILDOJ** — katalogo de Z-fotoj. La tuta nombro ĝis nun kolektita estas 260. Ili dividiĝas en ok grupojn. Se oni volas tiun materialon parte aŭ tute, petu rekte la katalogon de S-ro DE Henk THIEN, Uiterwardenstraat 12, Amsterdam, Nederlando.

nuna serio de vizitotaj lokoj inkluzivas 11 urbojn en Okcidenta Eŭropo. Interesiĝantoj sin turnu rekte al la Internacia Turisma Centro, gebouw 114 SCHIPHOL, Nederlando.



## Korespondi Deziras

\***Junulara grupo ĉe la Fervojsita Klubo en Taliinn, Estonio, USSR** dez. kor. pri diversaj temoj kun junularaj grupoj el tuta mondo, ankaŭ inter la diversnaciaj esp-istoj el Sovetio. Skribu al: "Amikeca Rondo", Tallinn 16, poŝtkesto 3.

\***Junulara Rondo ĉe Pola Esp. Asocio Filio en Opole, kune kun Vojevodia Kulturdomo en Opole**, intencas organizi en junio 1964 septagan Renkontiĝon de Esp-istoj dum Festivalo de Pola Kanteto, okazontan tiutempe en Opole.

Interesiĝantoj estas petataj turni sin por detalinformojn al: Pola Esp. Junularo, Vojevodia Kulturdomo, Opole, str. Strzelcow Bytomskich 8, Pollando.

\***Esperanta societo "D-ro L. L. Zamenhof"**, urbo Razgrad, Bulgario, per kamarado Drumi Mateev, str. "Al. Stamboljski" 53, ap. 6, intencas organizi ekspozicion celebrante la 20-an datrevenon de Socialisma Revolucio de Bulgario kun diversaj propagandaj materialoj, montrintaj precipe fortecon kaj disvastigadon de esperanta movado en tuta mondo.

\***Dunota Jurij**, pr. Gagarina 28, Dnepropetrovsk-10, USSR, kun ĉl. kaj interŝ. pk., pm.

\***Kaljo Maasik**, Komeedi 13-4, Tallinn, Estona SSR, USSR, kolektas pm. kaj pk.


\***Svetlana Nikolajeva**, str. Sverdlova 14, Taŝkent-P, USSR, dez. kor. kun filatelistoj.

\***Sro Majoro Najden G. Nedev**, kuracisto, Ruse, str. Solun, 2, Bulgario.



*Polaj Gejunuloj Interesiĝas pri Ĉinio.  
Foto de Jan Bukol*

## Plenigo per Ciferoj



**POSTULO:** Enskribu la dek unu ciferojn de 1 ĝis 11 en la kradojn tiel ke la sumo de ĉiu horizontala aŭ vertikala kolono estas 18.

**PREMIO:** Unu ekzemplero de la jus aperinta bildrakonto *Sun Vukong Trifoje Batis la Spiriton de Blanka Skeleto* por la unuaj du solvintoj de ĉiu lando. Okaze de plimultaj samtempe (laŭ la dato de la poŝtstampoj) venintaj korektaj solvoj, ni decidis la premion per lotumo.

## Morto de Arbego

Klerulo, kiu emas pavi pri sia erudicio, iutage diris al kam-

parano: "Estas loko, kie la suno brilas tiel forte, ke brulmortiĝis eĉ dika arbego." "Sed kiel elkreskis tiu arbego?" demandis la kamarano kaj per tio embarasis la klerulon. "Ĝi el... elkreskis en la nokto," balbutis la klerulo post pena cerbumado.

## Malklereco


Patrino demandis al sia infano, ĵus komencinta sian lernadon: "Ĉu via instruisto estas bona?"

"Bona," respondis la infano, "sed ŝajnas al mi, ke li estas malklera."

"Kiel vi trovis tion?"

"Hodiaŭ dum aritmetika leciono, li eĉ demandis al mi kiom estas ses kaj tri!"

SOLVO DE LA DESEGNA PROBLEMO  
EN LASTA NUMERO



\***Nijole Blauzdiuniene**, Joniŝkelio 14-10, Pasvalys, Litova SSR, USSR, dentistino, kun ĉl. per il. bk. kaj kolektas artajn ekslibrisojn, ktp. Resp. garantiata.

\***Komarova Nina**, Omsko-30, st. Gogola, 78, kv. 4, USSR, dez. interŝ. bk. kaj kor. pri muziko, sporto.

\***Glinskis Stasis**, Pravieniŝkes, raj. Kaiŝiadoris, Litovio, USSR (30j. pentristo) dez. kor. kun ĉl. pri belarto, literaturo, muziko. Proponas interŝ. per pentraĵoj kaj grafikaj reprodukcioj, gramofondisko de simfonia muziko, il. pk.

\***S-ro Georgi Todorov Bodurov**, poŝt oficisto, Ruse, str. Al. Atanasov, 12, Bulgario.

\***Rimma Gaĥ**, Komjaunimo 12-1, Vilnius-C, Litovio, USSR, dez. interŝ. leterojn kaj pk. kun ĉl.

\***F-ino Todoroka Velikova Dimitrova**, Bjala, str. Volov, 39b, Bulgario.

\***S-ro Simeon Todorov**, leterportisto, str. Gurko, 4, Ruse, Bulgario.

\***S-ino Lejla Saramova**, leterportistino, str. Car Petar, 4, Ruse, Bulgario.

(Daŭrgio sur p. 137)

# EL POPOLA ĈINIO

Dumonata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro (3) 86 1964**

## Ĉefa Enhavo

*Bildo sur la kovrilo* — Brodantaj Knabinoj.

Lignogravuraĵo de Zeng Zong-jin kaj Hunang Ĉanghong

La Nordokcidento de Ĉinio  
Armeanoj — Terkulturaj Pioniroj  
La "Nokta Foiro" de Teknikaj Kunlaboroj

Ĉe la Bordoĵ de Jili-rivero  
Agronomiaj Eksperimentoj en Nia Komunumo

300 Specoj da Fruktoj  
La Plej Varma Loko en Ĉinio  
Li Daĝaŭ — Iniciatinto de KPĈ  
Ĝojo de Maljuna Tradukisto  
Mirindaĵo Koncerne al Mono  
La Blanka Velŝipeto

Tra la Persikfloroj  
Revido pri Ĉinio  
Nia Bela Hingiang (*kanto*)  
Veĵcio

Post la Kurso  
Skribas Niaj Legantoj  
Esperanto Marŝas  
Sur Nia Libroreto

? Kiujn artikolojn kaj bildojn de nia gazeto en tiu ĉi jaro vi plej ŝatas? kaj kiujn ne? Respondu bonvole! Tio donos orientilon por la plibonigo.

— La Red.



Novaj Trajtoj en Montaro

Foto de Du Jumin

